


Bulgara Esperantisto

Oktobero 1991



ENHAVO

- 4 Malnovaj ideoj kun novaj proponoj (D. Mutuŝev)
- 5 Pri la genezo de sufikso -ig- (C. Murgin)
- 6 BET en Torino (B. Beleva)
- 8 La novo ne ĉiam estas pli bona ol la malnovo (L. Mihajlov)
- 10 "Min obsedas la liriko..." (G. Mihalkov)
- 11 Ni recenzas
- 13 Beletro: Migjeni, La malpermesita pomo (Trad. G. Muĉo)

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA

Redakcia konsilantaro: Dimitâr HAĜIEV, Georgi MIHALKOV, Kiril VELKOV, Krastju KARUCIN, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: "Ĥristo Botev" 97, 1303 Sofio - Bulgario, tel. 31-87-75

Ofsetpresejo ĉe Firmao "Pres-Esperanto", str. "Angelov vraĥ" 23, Sofio.

Al la kunlaborantoj: Kontribuadojn por la koncerna numero ni akceptas unu monaton antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario "Bulgara Esperantisto" estas abonebla per la poŝto kontraŭ 9.60 lv. Por aliaj landoj - pere de naciaj poŝtoj kaj UEA (kodo: prsp-r) aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 ned. gld. aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por eksterlando pagita ĉe la redakcio de "BE" estas 25 lv. Prezo de unuopa ekzemplero - 1.00 lv. aŭ 3 ned. gld.

"Bulgara Esperantisto" tutjare estas abonebla ĉe Firmao "Pres-Esperanto". Jarabono por 1991 de "BE" estas 12.00 lv.

REKLAMTARIFO

| 1 paĝo | 1/2 paĝo | 1/4 paĝo | 1/8 paĝo |
|----------|----------|----------|----------|
| 712 lv. | 356 lv. | 178 lv. | 89 lv. |
| 990 gld. | 495 gld. | 247 gld. | 123 gld. |

La Redakcio de "BE" aperigas reklamojn en diversaj lingvoj ofertitajn de bulgaraj aŭ eksterlandaj entreprenoj, organizoj aŭ privataj personoj. Makleraĵo por havigo de reklamoj 20%. Movada rabato 50%. Ekstera kovrilpaĝo kostas 50% pli. Rabato por tuja ripeto 20%.

"Bulgara Esperantisto" havas abonantojn en 57 landoj.

Represo el "BE" permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de "Bulgara Esperantisto" por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Vidajo el Bergen, Norvegio - loko de la 76-a UK de Esperanto.

ESTRARO

de Bulgara Esperanto-Asocio

Petar Todorov, prezidanto (internacia agado, financoj)

Venelin Mitev, vicprezidanto (kultur-informa agado)

Kiril Velkov, vicprezidanto (instrua, scienca agadoj)

Prof. Kiril Popov, ano (faka agado, neesperantistaj organizaĵoj)

Ljubomir Trifonĉovski, ano (junulara agado)

Georgi Mihalkov, ano (E-kulturdomoj)

Svoboda Damjanova, ano (ĉefdelegito por Bulgario ĉe Delegita Reto de UEA)

Enjo Enev, ano (terminologia agado)

Adreso: Bulgara Esperanto-Asocio, bulv. "Ĥr. Botev" 97, BG-1303, Sofio, tel: 31-00-29, 32-40-68

Niaj perantoj

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000
ANTWERPEN

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa
Postal 11-1105,
70084-BRAZILIA-DF

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield Road,
North Thoresby, Great Grimsby,
SOUTH HUMBERSIDE DN36
5RT

FRANCIO

Federation Esperantiste du
Travail, 115, Rue Beranger,
F-92320 CHATILLON

Union Francaise Pour
L'Esperanto, 4 Bis, Rue de la
Cerisaie, F-75004 PARIS

HISPANIO

Jorge Moragues Penella, Pintor
Domingo 2-2, 46001 VALENCIA

IRLANDO

Esperanto-Asocio de Irlando, 9
Templeogue Wood, DUBLIN 6W

JAPANIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono
1-2418-18, TOKORAZAWA, 359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. "Dame
Gruev" 65, YU-96000 OHRID

PORTUGALIO

Portugala Esperanto-Asocio,
A.S. Almeida, R. Dr. Joao
Couto, 6, r/c.A, P-1500 LISBOA

SUD-AFRIKO

C.S. Beckford, P.O. Box. 1227,
CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto League for North
America, Inc. P.O. Box 1129, EL
CERRITO, CA, 94530

Jaro 60

N-ro 10

Bulgara Esperantisto

FONDITA EN 1919, ORGANO DE BULGARA ESPERANTO-ASOCIO

TUTMONDIĜO, DIVERSIĜO, PROFESIĜO

Notoj pri la 76-a Universala Kongreso de Esperanto

Tutmondiĝo, diversiĝo, profesiĝo - jen estas la tri tendencoj, kiuj elstaras en nia movado ĉe la sojlo de la lasta jardeko de la jarmilo. En la sekvaj dek jaroj tiuj tendencoj kundifinos la taskojn de UEA.

Tio ĉi estas la ĉefa konkludo, kiun faris la partoprenantoj en la 76-a Universala Kongreso de Esperanto en Bergeno.

LA KONGRESURBO

La historio de Bergeno komenciĝas, kiam finiĝis la vikinga epoko. Ĉirkaŭ la jaro 1070 la reĝo Olav Kyrre fondis la urbon en nature konvena loko, kie la Golfa Fluo kondukas la varmon de la Sudo al la bordoj de la Nordo kaj kie jam troviĝis tre bona haveno. La bazo de la urba evoluo estis la maro kaj la komerco trans la maron al la grandaj eŭropaj merkatoj. Rapide kreskis Bergeno kaj ĝi fariĝis sidejo por la reĝoj de Norvegio. La fajroj furiozis super la lignaj konstruaĵoj, la ekonomiaj cirkonstancoj variis, sed la vivo daŭris kaj tiu ĉi jam la plej granda urbo en Nordio evoluiĝis kaj renoviĝis tiel, ke hodiaŭ ĝi estas tre aktiva, moderna loĝadejo, kie la industrio kaj la metio konkuras kun la komerco kaj la ŝiptrafiko pri la unua rolo en la vivo. Sed Bergeno estas ankaŭ la turisma centro de Norvegio kaj urbo kun enviindaj kulturaj tradicioj. Mi notos nur, ke tie loĝis kaj verkis tri eminentuloj: Henrik Ibsen, Edvard Grieg kaj Edvard Munch - dramverkisto, komponisto kaj pentristo, kiuj estas tiel famaj, ke oni kutimas diri: Ha, ĉu ili estis norvegoj?

La urbo estas belega! Tiom da verdeco, flo-

roj, pitoreskaj montoj kaj akvujoj, elegantaj du- kaj trietaĝaj domoj, afablaj kaj ridetantaj homoj, agrablaj kafejoj kaj plenplenaj magazenoj, perfekte organizita transporto kaj ĉiam kristale puraj stratoj mi delonge ne vidis vagante tra la mondo.

Unu el la vidindaĵoj de Bergeno estas la elstara kaj tre populara koncertejo Grieg-halo, kiu dum ok tagoj estis nia komforta kaj gastema kongresejo.

LA KONGRESA PROGRAMO

Ĝi estis tre riĉa kaj varia. Post la solena inaŭguro, kiun ĉeestis pli ol 2000 kongresanoj, sed poste alvenis ankoraŭ kelkaj centoj, sekvis ĝeneralaj kunsidoj, fakaj kunvenoj, Cseh-kaj konversaciaj kursoj, internacia kongresa universitato, 15-a esperantologia konferenco, nacia kaj internacia vesperoj, kelkaj tre interesaj prelegoj je la kongresa temo "Nordio - ĉu modelo?", transdono de gravaj premioj pro Esperanto-agado, prezento de la fama "Pupohejmo" de Ibsen, rok-koncertoj de "Persone" kaj "Amplifiki", koncerto de la duopo Ĵumart kaj Nataŝa el Sovetunio, aŭkcio, tuttagaj ekskursoj, dum kiuj la kongresanoj havis okazon ĝui la belecon kaj majeston de kelkaj el la plej ĉarmaj norvegaj fjordoj...

Kiel ĉiam, la diskutoj kaj dum la ĝeneralaj kunsidoj, kaj dum la fakaj kunvenoj estis vivecaj, ĉar temis pri pluraj akre aktualaj, vivnecesaj problemoj de la movado kaj ankaŭ pri bremsoj, kiujn ni spertas en niaj klopodoj progresigi la internacian lingvon kvante kaj

kvalite. Kompreneble, estis diversaj opinioj, ofte eĉ kontraŭstaraj, sed reliefigis multaj komunaj pritaksoj kaj konkludoj.

La ĉefa estas, ke 1990 ne estis simple unu plia jaro, sed ĝi estis la plej nova kaj la plej promesoplana jaro de la lastaj jardekoj. Antaŭenpaŝoj en Azio kaj Afriko, dua UK en Latinameriko, lanĉo de kulturaj kaj sciencaj iniciatoj, kreskanta membraro - jen kelkaj signoj de prospero.

En 1990 daŭris intensa membrovarba kampanjo, kiu komenciĝis fine de 1989. La rezultoj de tiuj klopodoj pli klare aperos en la ciferoj de 1991, sed jam en 1990 enskribiĝis rekorda nombro de 7645 individuaj membroj (kresko de 290 kompare kun 1989). La antaŭa postmilita rekordo de 7542 membroj datiĝis de 1957.

Multaj eldiroj estis dediĉitaj al la profundaj ŝanĝoj en Eŭropo, kiuj kaŭzis eksterordinarajn malfacilaĵojn por la orienteŭropaj landaj asocioj. Pro tio lastatempe la estraro de UEA dediĉas apartan atenton al ili laborante laŭ jena metodo: kolektado de spertoj, analizado, perado de rezultoj kun komentoj. Per tio ĝi celas stimuli la spertinterŝanĝon kaj kunlaboron inter asocioj kun similaj problemoj kaj celoj. Rezulte jam fortiĝas la tendenco al regiona kunlaboro. Mi notos interalie, ke en la kadroj de la kongreso okazis ankaŭ interesa renkontiĝo de gekongresanoj el la balkanaj landoj.

En la estrara raporto tamen estis speciale emfazite, ke la evoluo en la ekssocialismaj landoj estas cetere tute ne unueca. Kvankam ĉiuj frontas ekonomiajn problemojn, aliaj faktoroj tre diversas. Provizore ŝajnas, ke la slovaka kaj hungara asocioj travivas la krizon plej sukcese, kaj la pola malplej; sed klara bildo de la postreforma orienteŭropa movado venos nur post kelkaj jaroj. Parolante kun multaj gesamideanoj el orienteŭropaj E-movadoj mi tamen ĝoje konstatis, ke malgraŭ ĉiuj nunaj grandaj malfacilaĵoj, precipe financaj, nia asocio estas la plej stabila. Pruvas tion ĉi interalie la fakto, ke restis nur "Bulgara Esperantisto" - la presorganoj de la aliaj parencaj asocioj ne plu aperas.

En Bergeno oni menciis, ke la plej dramaj ŝanĝoj lastatempe estis: la apero de nova landa asocio en Rumanio, kiu tuj ricevis grandskalan praktikan kaj moralan subtenon de alilandaj esperantistoj; kaj la malapero de tiu en GDR, kiu ekde 1991 ne plu membras en UEA cele al kunfandiĝo kun Germana E-Asocio. La rumana asocio cetere ankoraŭ frontas grandajn malhelpojn en sia agado. Pli

oriente, la sovetia movado vigle plu evoluas, kun malmulta kunordigo je tutlanda nivelo. En UEA nun membras kvin landaj asocioj el Sovetunio, kvar el unuopaj respublikoj kaj unu (Sovet-respublika Esperantista Unio) kun nedefinita teritorio.

La kongresanoj konstatis, ke post kelkaj malfacilaj jaroj Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) denove havas stabilan estraron, travideblan financon kaj bazon por pluevoluigi la agadon - precipe en sia fortika reto de interpersonaj kontaktoj, kiuj pli kaj pli etendiĝas ekster Eŭropon. En la ĵus finita Internacia Junulara Kongreso en Karlskoga, Svedio, la Komitato de TEJO elektis la jenan estraron: Saskia Izquerda, Nederlando, prezidanto; Andy Kunzli, Svisio, vicprezidanto kaj respondeculo pri Landa Agado; Sabira Stahlberg, Finnlando, vicprezidanto kaj respondeculo pri la Komisiono por Eksteraj Rilatoj.

Alia ĝojinda fakto estas la plibonigo de la laboro de la fakaj asocioj. Nun en la Jarlibro de UEA aperas 56 fakaj asocioj, el kiuj ses aliĝintaj, 32 kunlaborantaj kaj 18 neligitaj. El ili 23 funkcias lige kun profesio, 12 interreligianoj, 12 laŭ libertempa ŝatokupo, kaj la ceteraj okupiĝas pri la solvo de definitiva asocia problemo, aŭ grupigas homojn laŭ mondkoncepto.

Denove la plej frapa evoluo pri la scienca uzo de Esperanto estis konstatita ĉe Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Fondiĝis la unuaj landaj filioj, kun rajto organizi studsesiojn kaj kursojn.

LA BULGARA PARTOPRENO

Pro kompreneblaj financaj kaŭzoj, la kongreson partoprenis nur kelkaj bulgaroj, sed ĉiuj entuziasme aktivis kaj bone kontribuis al la sukcesa plenumo de la programo.

Ni diris niajn opiniojn kaj faris multajn konkretajn proponojn kaj dum la ĝeneralaj kunsidoj, kaj dum la fakaj kunvenoj, kaj dum la diskutoj en AIS, ISAE, TEJA kaj ILEI.

D-ro Kiril Velkov estis unu el la ok lektoroj en la Internacia Kongresa Universitato. Li prelegis pri la astronautiko hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ - temo, pri kiu ekinteresiĝis multaj kongresanoj. Parolante pri estonta ekspedicio al Marso, li substrekis, ke ĝi nepre estos internacia, do la multlingveco povus kaŭzi multajn malfacilaĵojn. Ĝis nun reprezentantoj de pli ol 20 nacioj estis en la kosmo kaj ili parolis aŭ la anglan aŭ la rusan depende de la ŝipo aŭ stacio, kie ili troviĝis. Sed kia devas esti la komuna lingvo de la

relative malgrandaj internaciaj skipoj? Kaj ĉu ĝi povas esti Esperanto?

Nia muzikisto Dimitar Terziev, ĉiam energia kaj entuziasmigita, ankaŭ ĉi-jare sukcesis organizi la Internacian Ĥoron fonditan de li en 1980 en Stokholmo. Mi kiel bulgaro estis senfine fiera, kiam dum la Internacia Vespero samideano Terziev aperis sur la podio kaj sub lia majstra gvido dekoj da ĥoranoj ekkantis belege klasikajn kaj nuntempajn muzikverkojn. Poste ekkantis la tuta impona halo... Ne malpli granda estis mia emocio, kiam la ĥoro kantis en la centro mem de la urbo antaŭ miloj da bergenanoj kaj eksterlandaj turistoj.

Tre fruktodona estis la partopreno en la kongreso de nia fama pedagogo Marin Bacev, kiu organizis kaj gvidis konversacian rondon. Eva Bojaĝieva estis membro de la komisiono pri Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA.

KUNE AL KOMUNAJ DEFIOJ

Mi jam notis la tri tendencojn, kiuj staras en nia movado ĉe la sojlo de la lasta jardeko de la jarmilo. Unue, tutmondiĝo. Kaj en la estrara raporto, kaj en la kongresaj disputoj estis metitaj en antaŭan lokon novaĵoj pri lan-

doj, kie antaŭ dek jaroj Esperanto estis plene nekonata. Multloke UEA investas en tiuj novaj movadoj, celante plifortigi ilin kaj ligi ilin kun la internacia movado. Al la dua tendenco, tiu de la diversiĝo kaj multiĝo de iniciatoj kaj centroj de agado, UEA kontribuas kiel informcentro, internacia merkato kaj forumo por kunlaboro. Kaj laste, pli kaj pli oni konstatas la neprecon de profesiuloj, laborantaj apud kaj inter la libervolaj movadanoj, respondantaj al ties bezonoj kaj ebloj. Ankaŭ volontulajn fortojn oni povas kaj devas trejni.

Substrekante, ke en la sekvaj dek jaroj tiuj tendencoj kundifinos la taskojn de UEA, la kongreso en Bergeno konkludis, ke gravas por ni ĉiuj, ke ĝi sukcese frontu la defiojn tiel starigitajn. Kaj tial gravas ĝuste la subteno de ĉiu membro kaj aktivulo. La mondo ja ne simple portas nin kun si. Sen la pacienca laboro de multaj miloj da homoj ĉirkaŭ la mondo Esperanto ne povus daŭre adaptiĝi kaj disvastiĝi responde al novaj ŝancoj kaj defioj. Mi forte esperas, ke ĉiuj aktivuloj de BEA, ĉiuj membroj bone komprenos la profundan sencon de tiuj tri gravaj taskoj kaj estonte senlace laboros por ilia sukcesa plenumo.

Venelin MITEV

Esperantista Unesko-asocio fondiĝis

Dum la Universala Kongreso en Bergen fondiĝis nova internacia asocio "Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo" (mallonge: Monda Kunagado). Ĉirkaŭ 60 personoj partoprenis la fondkunvenon, diskutis la statuton kaj elektis konsilantaron kiel gvidorganon de la asocio.

Monda Kunagado celas agadi per propraj interesaj projektoj sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, perante la ideojn de paco kaj internacia interkompreniĝo, konforme al la celoj kaj idealoj de Unesko kaj kunlabore kun ĝi. Ĝi subtenas la starigon de kontaktoj inter Unesko kaj

Esperanto-movado. Tiucele ĝi kontaktis la Unesko-sekretariaton, kiu sendis salutmesaĝon al la fondkunveno. En sia mesaĝo al la UK ankaŭ la ĝenerala sekretario de Unesko F. Mayor aparte bonvenigis la fondon de esperantista Unesko-asocio.

Por publikigi siajn ideojn kaj projektojn, Monda Kunagado eldonas revuon "Monda Forumo", kies provnumeron ĉiu kongresano trovis inter siaj kongresaj dokumentoj. Unuaj projektoj estas preparataj kaj celas i.a. informadon pri la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo, la aplikon de scioj kaj talentoj de esperantistoj por eduki unu la alian, kaj la

starigon de internaciaj individuaj subtenaj kontaktoj helpe al la publikigo de vivraportoj el ĉiuj mondpartoj.

La kvin elektitaj konsilantoj estas Martha Andreasson (S), Ulrich Becker (D), Eva Bajaĝieva (BG), Mark Fettes (NL) kaj Lev Medvedev (SU).

Kiu ŝatas kunlabori, ricevi aliĝilon aŭ ekzempleron de "Monda Forumo" kaj statuton, informojn pri la projektoj de Monda Kunagado, aŭ iel ajn kontribui al ĝi skribu al: Eva Georgieva Bojaĝieva, ul. Generalo Skobelev 8, BG-4000 Plovdiv, Bulgario.

**Ulrich BECKER,
Germanio**

Malnovaj ideoj kun novaj proponoj



Antaŭ kelke da tempo mi vidis sur blanka folio bone preparitan emblemon: verda stelo ĉirkaŭata ambaŭflanke de 3 manoj kaj surskribo "2-a Balkana Esperanto-Kongreso, Ateno 1984". Tio estas manoj de esperantistoj el ses Balkanaj landoj: Albanio, Bulgario,

Greklando, Rumanio, Turkio kaj Jugoslavio. Ili zorgas pri defendo kaj prospero de esperantistaj movadoj en tiuj landoj, kies simbolo estas la verda stelo. Memorigante al mi tiun eventon, ĉi emblemo igis min pripensi pri la sekva renkontiĝo de la esperantistoj en urbo Ohrid (Jugoslavio) kaj pri la estonteco de similaj balkanlandaj iniciatoj.

Vere, la unua penso, kiu venis en mian kapon, estis: ĉu malnova ideo por Balkana Federacio estas vigla kaj povas esti aktuala ankaŭ nuntempe? Kia devas esti nia preteco por defendo de tiu ideo? La respondojn mi deziras vidi ne laŭ la nunaj malfavoraj kondiĉoj, precipe en Jugoslavio, sed ĉe aliaj cirkonstancoj en la estonteco. Eble, post kiam la balkanaj landoj pli intime komercos inter si, kunlaboros en la diversaj sferoj - kultura, scienca, turisma, sportista ktp., la sentoj kaj la pensoj de la loĝantaro el tiuj landoj estos orientitaj al kunlaboro kaj bonaj najbaraj rilatoj. La oftaj kontaktoj forigos la problemon pri la ŝtatlimoj, pri la doganaj kontroloj, pri valideco de personaj vojaĝpasportoj ktp. Se venas pacaj tagoj, tiam la ideo pri balkana unueco trovos pli da adeptoj. Balkana regiono estos parto de Eŭropa Komunumo. Laŭ nia destino, la esperantistoj devas esti pioniroj de la balkana unueco.

Ni estas atestantoj de la regulaj renkontiĝoj de balkanaj landoj. Tio signifas, ke ni laboros ĉe pli bonaj historiaj kondiĉoj. Tiu konstato tamen ne sufiĉas. La esperantistoj devas bone orientiĝi en ili kaj trovi la ĝustan vojon kaj sian lokon en la ĝenerala kunlaboro inter la landoj. En la pasinteco la

bonan kontakton inter Bulgario kaj Greklando faris nome esperantistoj, tiam grekaj samideanoj vizitis nin kiel civitanoj de sia ŝtato. Tiu fakto montras, ke Esperanto estas kapabla por organizado de aranĝoj kun pli alta politika aŭ socia signifo. Grave estas, ke ni pridiskutu la problemon pri balkana federacio kiel formo por proksimiĝo de la popoloj. La diversaj opinioj utilis por la estontaj iniciatoj.

Estas sciata, ke ekzistis (ĉu nun ankaŭ plu?) Balkana Esperanto-Komitato (BEK). Ĝi enskribis bonajn paĝojn en la organizado de tutbalkanaj aranĝoj. En organiza plano de si mem venas la propono pri renovigado kaj aktivado de BEK.

Laŭ mi, la aktivado de BEK multe dependas de la interesiĝo kaj la zorgoj pri la naciaj E-organizaĵoj. Iliaj reprezentantoj devas renovigi BEK, kiu efektive taskojn akceptitajn de ĉiuj. Tamen por ke BEK estu pli aktiva organo, laŭ mi, estonte en ĉiu lando devas agadi E-grupo por balkana kunlaboro. Tiuj grupoj helpus la reprezentantojn por popularigo de Esperanto inter neesperantistaj establoj, institutoj, firmaoj k.a., kiuj laboras sur balkanlanda tereno kaj kontribuas por orientiĝo al Esperanto en la diversaj sferoj. Tiudirekte la ekzemplo de Bulgara Esperanto-Asocio estas sekvinda.

Antaŭnelonge okazis renkontiĝo inter reprezentantoj de BEA kaj Komitato pri Balkana Solidareco kaj Kunlaboro en Bulgario kaj estis pridiskutataj la eblecoj por komunaj iniciatoj. Jam en la gvidorgano de Komitato oficiale estas reprezentanto de BEA. Tio signifas, ke senpera estos la reciproka informado. La prezidanto de la Komitato Boris Velĉev orientiĝas pozitive al kunlaboro kun esperantistoj kaj pretas apogi konkretajn proponojn por kunaj aranĝoj. Li vidas bonajn perspektivojn en uzado de Esperanto en t.n. "popola diplomatio". La unua paŝo estis farita, tamen de la aktiveco de esperantistoj dependos la rezultoj. Mankas kaŭzoj, por ke ili ne estu pozitivaj.

Ĝojiga estas la novaĵo, ke dum la UK de Esperanto en Bergen (Norvegio) la reprezentantoj de balkania regiono provis kolekti kaj paroli pri kunlaboro. Tiu iniciato estas multsignifa kaj montras, ke nia regiono elpaŝas sur la internacia scenejo kun siaj problemoj, E-taskoj kaj estonteco.

Dimitar MUTUŠEV

PRI LA GENEZO DE SUFIKSO -IG-

(Daŭrigo)

Plue, por la sama tezo kontribuas la fakto, ke la radiko *instig-* (proksimume) deko da jaroj estis tenata for de la Esperanta vorttrezoro. Mi supozas, ke Zamenhof faris el tio taktikan elpaŝon. Li deziris, ke la unuaj adeptoj de Lingvo Internacia konscie ellernu la sufikson *-ig-*. Evidente Zamenhof deziris eviti delemojn. Tiu certe estus aperonta, se radiko *instig-* kaj sufikso *-ig-* estas lanĉitaj samtempe. Aperoj de problemoj ĉu sufikso *-ig-* estas tirita el radiko *instig-* estas neeviteblaj. Jen preteksto pro vanaj, ruinigaj diskutoj... Tial Zamenhof enkondukis radikojn *instig-* kun malfruiĝo - en 1894 (en la Universala Vortaro, unua eldono).

En la jaro 1907 respondante al demando pri sufikso *-ig-*, Zamenhof difinis (komplike) ties signifon kaj nuancojn (*-ig-* = "fari, lasi, kaŭzi"). Mi devas serĉi kontentigan eksplikojn pri tio, kiel Zamenhof atingis tiun rezulton, tiun precizan difinon (solvon). Antaŭ ĉio, estas necese analizi la morfologian kaj semantikan strukturon de la enigma radiko *instig-*. Vere, starigo de tia tasko certe ŝajnas iom stranga kaj mi nek miras, nek mi estas surprizita, ĉar antaŭ nelonge ankaŭ al mi mem ĝi ŝajnis stranga. Grandparte, la fakuloj pri latino konceptis la Esperantan morfemon *instig-* kiel kunmetaĵo de prefikso (*in-*) kaj radikalo (*stig-*). Por Zamenhof tio estis nur la unua etapo de diserigo. Li komprenis la aferon pli profunde, ĉar ekzistas ankaŭ dua etapo de diserigo. Laŭ Zamenhof la latina radikalo *stig-* ankaŭ estas kunmetaĵo (de du memstaraj radikoj): *stig-* = *st-* + *-ig-*. Do la Esperanta morfemo *instig-* estas monolita, sed la materialo el kiu ĝi estas farita konsistas el tri memstaraj morfemoj de latino (*instig-* = *in-* + *st-* + *-ig-*).

El latina radiko *st-* Zamenhof ne

povis fari morfemon pro manko de vokalo, tial li aldonis al ĝi parton de la infinitiva finaĵo: (*st-are* = *star-i*). La latina verbo *st-are* (*st-o*, *stet-i*, *staturus*, *-a*, *-um*) = *star-i* (en Esperanto) estas uzata en ĉiuj slavaj lingvoj, sed ne en ĉiuj latinidaj: en malnovbulgara (*stojati*), rusa (*stojati*), ukraina (*stojati*), bulgara (da *stojati*), pola (*stać*), serba (slava) a) en Supra Laŭzico - Germanio (*stojac*), b) en Malsupra Laŭzico - Germanio (*stojas*), ĉeĥa (*stati*), slovaka (*stati*), slovena (*stati*), serba-kroata (*stajati*, *stojati*), itala (*stare dritto*), rumana (a *sta*), litova (*stoti*), angla (*to stand*), germana (*stehen*), sveda (*sta*). En la lingvoj franca, hispana k.a. verbo kun tiu radiko (*st-*) mankas.

Fakte kaj latino kaj la slavaj lingvoj - plejparte - pere de malnovbulgara literatura lingvo rekte ĉerpis (en IX jc.) la radikojn (*st-*) el unu kaj sama fonto - la malnovgreka lingvo. Do la Esperanta morfemo *instig-* estas monolita, sed ĝi konsistas el tri fremdlingvaj eroj: prefikso (*in-*) kaj radikalo (*-ig-*) estas (2/3) kaj - venas el latino, la radikalo (*st-*) estas (1/3) - venas el malnovgreka. Sekve, la Esperanta morfemo *instig-* estas latino-greka. Nome, ĝuste tiaj hibridaj greko-latinaj vortoj jam dekomence atribuas al Esperanto internacian aspekton.

Dum certa epoko en la historio de mondo oni altigadis la atingojn de Okcidento kaj samtempe subtaksadis la Orienton. La jam ekalvenanta Epoko de Monda Paco portas freŝan vitalecon por la kultura disvolvado kaj novajn malnovajn de natur-sekretoj por plua deca progresado de homara civilizo. Bela estas la nuna perspekti-

vo, sed ĝi estas realigebla nur se la homaro, la nacioj kaj etnoj, se ĉiu homo kontribuadas ankaŭ por neniiigo de malbonintencaj ĝeneraligoj kaj prisilentoj, por detruo de falso kaj mensogo.

La dua radiko (*-ig-*) en la traktata "monolita kunmetaĵo" (*instig-*) venas el latina verbo *ag-are* (*ag-o*, *eg-i*, *actus*, *-a*, *-um*). Pri tio atentigas (1937) la slovena latinisto kaj Esperanto-verkisto prof. Franjo Modrijan (? - 1954) en sia verko "Elementoj Latinaj en Esperanto", Ljubljano (1937), p. 46 (vidu p. 33, paragrafo 164): La Esperanta sufikso (*-ig-*) venas el latina radiko (*-ag-*). Tio signifas, ke (*ag-* = *-ig-*), sed kiel okazis tiu metamorfozo Franjo Modrijan neniom eksplikas. Oni rajtas supoziti, ke temas pri kazo simpla, tre facila, populara kaj konata almenaŭ al la latinistoj. Bedaŭrinde, la senco de la afero estas tute alia. La traktata kazo (pri deveno de sufikso *-ig-*) estas malfacile digestebla eĉ por latinisto. Temas pri preskaŭ nedistingebla detalo el la morfologio de latino. Tial la nobla intenco de Franjo Modrijan restis en sia komenca etapo kaj ne sukcesis populariĝi inter la monda esperantistaro.

Zamenhof trovis en pluraj radikoj de latino la sufikson (*-ig-*). Unue altiris lian atenton la latina verbo *instig-are* (en Esperanto: *instig-i*). Zamenhof ekstraktis el ties radikalo la sufikson (*-ig-*). Kaj atribuis al ĝi sinonimecon de la tuta verb-radiko (*instig-*), t.e. (*-ig-* = *instig-*: stimuli al, puŝi al, peli al, inciti al):

instigi eniri = enirigi
instigi eliri = elirigi
instigi halti = haltigi
instigi dormi = dormigi

| infinitivo | prezenco, imperfekto | perfekto | participoj | | |
|------------|----------------------|----------|------------|-----------|------------|
| sub-ig-are | sub-ig-o | sub-eg-i | sub-act-us | sub-act-a | sub-act-um |
| ag-ere | ag-o | eg-i | act-us | act-a | act-um |

instigi rapidi = rapidigi
 instigi labori = laborigi
 instigi paroli = paroligi
 instigi sidi = sidigi
 instigi urĝi = urĝigi
 instigi koni = konigi
 instigi rajdi = rajdigi

Oni povas aserti sen troigo, ke Zamenhof konis parkere la fundamentajn formojn (infinitivo, prezenco-imperfekto, perfekto kaj participoj) de ĉiuj ofte uzataj verboj de latino, inkluzive de verbo agi = agere (ag-o, eg-i, act-us, act-a, act-um). Dank' al tio, li sukcesis sufiĉe frue (jam dum estis gimnaziano) rapide kompari kaj malkovri por si mem la devenon kaj la naskiĝlokon de diversaj morfemoj tuj aŭ poste uzataj dum la esplorkomparoj pri starigo de Lingvo Internacia. Tio okazis ankaŭ ĉe sufikso (-ig-). Foje, dum li skribis solvon de sia hejma ekzerco, (kies teksto estis speciale kompilita de profesoro-latinisto) Zamenhof devis okupiĝi interalie pri kunmetita verbo subigi (sub-ig-are). Por povi paralele kompari la koncernajn fundamentajn formojn Zamenhof kompilis tabelon pri tiuj formoj de la verboj (sub-ig-are). Por povi paralele kompari la koncernajn fundamentajn formojn Zamenhof kompilis tabelon pri tiuj formoj de la verboj (sub-ig-are kaj ag-ere) (Vd. tabelon sur paĝo 5).

El tiu tabelo Zamenhof konkludis, ke la participoj de ag-ere kaj la participoj de la kunmetita verbo kun prepozicio (sub-) estas identaj. Tio direktis lin al supozo, ke la kunmetita ag-ere (sub- + ag-ere = sub-ig-are).

Ankaŭ la identeco inter la formoj de perfekto-tempoj konfirmas la samon t.e. la kunmetita verbo estas: sub- + ag-ere (= sub-ig-are). Tiuj argumentoj potence konvinkas la legantojn, ke la formoj de prezenco-imperfekto-tempoj ankaŭ apartenas al verbo agere (ag-), kiam ĝi estas memstara kaj (-ig-), kiam ĝi estas kunmetita kaj staras en fino de kunmetita radikalo.

Do, la sufikso (-ig-) en Esperanto devenas el prezenco-imperfekta radikalo (-ag-) de verbo agere, kiam tiu estas ĉefvorto de kunmetaĵo (-ig-o = -ag-o).

Canko MURGIN



BET en Torino

"Brila sukceso!", "Verva aktorado!", "Perfekta sceneja Esperanto!", "Neripetebaj gestoj, mienoj!", "Brave! Brave!". Brave al itala klasikulo Carlo Goldoni (1707-1793), brave al la tradukinto en Esperanton italo Carlo Minnaja, brave al ĉarma Mirandolina - ĉefrolo de bulgara aktorino Veneta Zjumbjuleva, brave al la sprita reĝisorado de la bulgara aktoro Teo Jurukov, brave al pentristino Maja Uzunova pro la belaj stilaj kostumoj, brave al pitoreskaj figuroj de Uzunov (sper-ta gvidanto de BET), Zlatarev, Siromaĥov, Beleva...

Brave al la spektaklo "La gastejestrino" de Goldoni, kiun prezentis trupo de Bulgara E-Teatro la 25-an de aŭgusto en Torino por la 400 partoprenantoj de la 62-a Itala kongreso de Esperanto.

Ĉe la fermo de la kongreso - aplaŭdoj kaj florbukedoj prezentitaj de prof. Fabricio Pennacchietti, prezidanto de LKK.

Denove travivo de riĉa etoso de esperantistaj renkontiĝoj! Ĝi ĉeestis la rondan tablon, kie oni pridiskutis la kongresan temon "Esperanto por la defendo de la etnaj lingvoj kaj kulturoj minoritataj". Elstaraj sciencistoj prelegis en Esperanto kaj itala; sekvis kvinminutaj eldiroj de junaj geesperantistoj pri etnaj lingvoj minoritataj: baska, kataluna, sardina k.a. Konkludo: ĉiu etna minoritato rajtas uzi sian nacian lingvon, kaj Esperanto kiel neŭtrala forŝovas neniun.

Torino - kun urba centro baroka, monumentoj interesaj, kun moderna "teatro reĝa", sidejo de aŭtomobila firmao "Fiat". Dum la urba promenado fluas interparolo kun familio Grattapaglia, kun familio Gimelli. En Via Garibaldi ni vizitas Ekspozicion de UEA kaj filatelan kolekton "Mario Dazzini". Vespere por la kongresanoj kantas kaj dancas folkloraj trupoj de regiono Piemonte.

Ni loĝas en Universitata restadejo en Via Verdi, apuda - Via Rossini, proksime rivero Po... Kio estas pli forta - itala kulturo aŭ esperantista etoso?

En la restadejo nin renkontas Michela Lipari, manpremas s-ro Pinnacchietti, la sekvontan matenon salutas nin per ĝoja krio la senlaca Gian Carlo Fighiera, vicprezidanto de LKK, kiu preskaŭ jaron zorgis pri aranĝo de nia partopreno; Ada Sikorska dediĉas sian novan libron "De tajgo al minaretoj"; virinoj en folkloraj kostumoj prezentas al ĉiuj artfoton de Torino.



Jen solena inaŭguro! En la listo de Honora Komitato unue vicas la nomo de ĉefministro Giulio Andreotti, sekvas prezidantoj, skabenoj, rektoroj... La enkondukaj vortoj pri la kongresa temo apartenas al prof. John Wells, prezidanto de UEA. Salutojn prezentis ankaŭ bulgaroj je la nomo de la prezidanto de BEA, Petar Todorov kaj en la nomo de BET, esprimante dankon pro la invito.

Sed la ŝvitaj fruntoj apartenas al LKK-anoj, kiuj dum la sekvontaj tagoj estiĝas niaj bonaj interparolantoj.

Ni revenas al Torino.

"Ĝis revido!", "Adiaŭ!", "Ni invitas vin al nia sekva kongreso!"...

Ĉiuj libroj, gramofondiskoj, esperantaĵoj, popolstilaj memoraĵoj, kiujn ni kunportis, estas donacitaj. La koroj revenas hejmen plenaj de krea ĝojo, de nacia fiero, ĝuintaj la esperantistan etoson.

Nun plu venas fotoj... Ni atendas intervjuojn, resonojn en itala kaj esperantista gazetaro.

Ni atendas invitojn prezenti "La gastejstrino"-n por ĉiuj esperantistoj en nia lando.

Ĉar la esperantistoj en la lando de Goldoni salutis nin per "brave!".

Belka BELEVA

RESONOJ

El ĵurnaloj "La Stampa", "Gazeta del Piemonte" kaj informagentejo ANSA:

- "La monda premiero de la ĉefverko de Goldoni "La gastejstrino" en Esperanto estas prezentita en teatro "Agnelli" de teatra trupo el Sofia."

El oficialaj leteroj:

- **Prof. Fabricio Pennacchietti**, prezidanto de LKK: "... profesia kompetenteco kaj brila humanismo de la Trupo. Vi plialtigis la prestiĝon kaj la kvalitan nivelon de nia kongreso. Pro tio ni estas ege dankaj kaj al vi, kaj al frata Bulgario, kiu elkreskigis tiajn aktorojn."

- **Carlo Minnaja**, tradukinto de la komedio: "Nova perlo aldoniĝis al la koliero de via repertuaro."

- **Gian Carlo Fighiera**, vicprezidanto de LKK: "BET ludis brile kaj inteligente. La tuta reĝisorado tre elstare interpretis la Goldoni-an spiriton kaj subtilan spritecon, sen enfali farson. La geaktoroj respektis la elegantan etoson de la verko kaj ege bone distingis la personecon de ĉiu komedia figuro."

PUPTEATRAĴO EN ESPERANTO

Ŝtata Pupteatro - Plovdiv, preparis en Esperanto la spektaklon laŭ teatraĵo de Nedjalko Jordanov "La lupo kaj sep kapridoj" (tradukis F. Miĥajlova). Reĝisoro - Leonard Kapon, scenografo - Virĵinia Petkova, muziko - Petar Cankov. Rolantoj: Kaprino - Enĉo Danailov; Lupo - Vencislav Geŝev; Leporo, Ursino, Pigo, Kapridoj - Margarita Apostolova, Lilia Mostrova-Kapon.

Fondita en 1946, la plovdiva pupteatro ĝis nun surscenigis pli ol 200 teatraĵojn de bulgaraj kaj alilandaj aŭtoroj, kiujn prezentis antaŭ pli ol tri milionoj da spektantoj. Ĝi estas laŭreato de naciaj kaj internaciaj premioj. La spektaklo "La scivola elefantido" ricevis unuan premion en PIF en Zagrebo-1973. Spektakloj de la Ŝtata Pupteatro - Plovdiv, estas prezentitaj en multaj landoj de Eŭropo, Afriko kaj Azio.

Fani MIĤAJLOVA

KANTKONCERTO EN PLOVDIV

La kantgrupo ĉe "Arta Klubo-84" - Plovdiv, videble antaŭenmarŝas, paŝo post paŝo progresas. Ĝi riĉiĝis per bonaj voĉoj, en ĝi partoprenas ankaŭ kelkaj junaj virinoj. Kaj nun venis tempo, ke ĝi montru sian kapablon, sian rezulton ne nur antaŭ esperantistoj, sed ankaŭ antaŭ alia publiko.

Tiel, helpe de E-kulturdomo - Plovdiv, la 28-an de junio k.j. estis aranĝita koncerto en la salono de sama domo. En la repertuaro de la grupo oni povis aŭskulti bulgarajn klasikajn komponistojn, samkiel melodion, faritan de gvidantino drino St. Stamatova. Solistinoj de la grupo estas Eva Bojaĝieva kaj Slavka Sokolova. Bonefika estis tiu unua pruvo, kiu ĝuis la aprobon kaj kontentigon de la publiko. La multaj aplaŭdoj estis plej bona rekompenco pro la persista laboro de la entuziasma grupo, kaj ili kuraĝigis la grupon por pli altnivelaj atingoj.

Veselina KURTEVA

LA NOVO NE ĈIAM ESTAS PLI BONA OL LA MALNOVO

Ekzistis dum multaj jardekoj sur la teritorio de Sofio solida, multmembra Esperanto-societo "Maksim Gorki", kiu per sia celkonforma agado gajnis tian renomon, ke fariĝis ekzemplo ne nur por la ceteraj enlandaj Esperanto-societoj, sed ankaŭ por multaj Esperanto-societoj tra la mondo.

Subite tamen, dum ĝia plej prospera agado la societo estis likvidita. Instigo estis la administracia divido de Sofio en ses urbdistriktojn. La formala logiko decidis, ke, se ekzistas ses urboj Sofio, devas ekzisti ses societoj "Maksim Gorki". Fonditaj estis ses societoj kun diversaj nomoj.

Kiel ĉiam kiam enmiksiĝas la formala logiko, tiel ankaŭ ĉi-okaze elnaĝis seriozaj minusaj sekvoj. Pruviĝis, ke tion, kion la tutaj kapablis fari, ne kapablis fari la eroj. Pruviĝis, ke la kultura laboro, kiun efektivigis la malnova societo, ne estis laŭ la forto de ties heredantoj. Pro tio, denove oni aplikis la formalan logikon kaj kreis la t.n. kulturdomon. Al ĝi estis komisiita kultura laboro, kiun la movefonditaj societoj devis efektivi. Nun tamen la minusoj de la aplikita logiko transformiĝis en absurdon. Ne estas necesa multa rezonado por malkovri ĝin. Kultura organizaĵo estas la organizaĵo kiu mem evoluigas la kulturan laboron, por kio ĝi estas kreita. Eligi el tia organizaĵo ties kulturan laboron signifas lasi la organizaĵon sen enhavo. Se temas, ekz., pri profesia organizaĵo de ŝulaboristoj, ekzisto de kulturdomo estas memkomprenebla. Ekzisto tamen de kultura organizaĵo, kia estas la Esperanto-organizaĵo, sen kultura laboro estas mallogikaĵo.

La hodiaŭan apelon restaŭri "Maksim Gorki" ne malofte kontraŭstaras jena repliko. Se restaŭriĝos "Maksim Gorki", diras la oponantoj, la seĝoj en la disponebla salonego ne sufiĉos por la membroj de societo. Do, laŭ tiu ĉi pozicio pli grave estas ekzisti nekapablaj societoj ol kapablaj societoj kun senseĝaj ĉeestantoj. Oni forgesas, ke starantaj kunvenintoj estas tre bona propagando por Esperanto.

En la fonto de menciita repliko fakte kuŝas ia miskompreno pri la ĉefa celo de Esperantomovado.

La ĉefa celo de Esperantomovado estas "produkti" Esperanto-parolantojn, ne Esperanto-societanojn. Esperanto-societanoj estas nur tiuj Esperanto-parolantoj, kiuj deziras,

unue, perfektigi siajn konojn pri Esperanto en tiu "pli alta kurso", kia estas la societo, kaj, due, partopreni aktive en la "produktado" de novaj Esperanto-parolantoj. La Esperanto-societo ne estas loko por ĉiuj Esperanto-parolantoj. Se oni konscios ĉi tiun veron, oni ne timos la "seĝan problemon".

Eventuala repliko, ke la koncepto Esperanto-parolanto/Esperanto-societano malpliigos la enspezojn (en formo de membrokotoj) de la Esperanto-societoj, ne meritas konsideron. Almenaŭ ne pravigeblas tia repliko de movado kiel la bulgara, kiu per la posedata firmao akiras la necesan monhelpon.

Ljubomir MIĤAJLOV

LA STANDARDO DE "VEKIĜO"

Ankoraŭ kiam estas fondita la ŝumena E-societo "Vekiĝo" en 1905, la unuaj entuziasmaj esperantistoj, inter kiuj estas instruistino Anastasija Radeva, gimnaziano Jordanka Djukmeĝieva - poste edzino de Ilija Silvestriev, iniciatinto de l'societo kaj aliaj, kudris societan standardon. Ĝi estas el verda silka ŝtofo, ĉirkaŭita de orumitaj franĝoj kaj ambaŭflanke en la supra maldekstra angulo sur blanka margeno estas verda stelo. Ankaŭ per orumitaj fadenoj estas broditaj sur unu el la flankoj la nomo de societo kaj la jaro de ĝia fondiĝo, kaj sur la alia - la vortoj "Esperanto - lingvo de l'amikeco".

De tiam kaj ĝis nun la standardo fiere flirtas en la manoj de generacioj da ŝumenaj esperantistoj. Ĝi estis je la scenejo de la legejo "Arĥ. Miĥail" (nun "Dobri Vojnikov") dum la Dua kongreso de BEA en 1908, kiam unuafoje ĉeestas gastoj el Rumanio kaj Rusio. Ĝi estas ankaŭ en la teatro "Vasil Drumev" dum la 42-a kongreso de BEA. La standardo estas kunportata al multaj manifestacioj, al naciaj kaj internaciaj E-aranĝoj.

Por pli bona kaj sekura konservado la standardon oni transdonis al ŝumena muzeo. La ŝumenaj esperantistoj havas rajton uzi ĝin en ĉiuj solenaj kaj aliaj necesaj okazoj. La standardo estas unua eksponaĵo en estonta muzea fako dediĉita al la loka E-movado.

Cvjatko TODOROV

MONDCIVITANOJ EN SOFIO

En Sofia E-Kulturdomo gastis esperantista grupo el Francio. La gvidanto de la grupo s-ro Claude Tellier el Tours prezentis la agadon de la mondcivitanoj. Li sciigis interesajn faktojn pri tiu specifa movado.

Estis emfazite, ke mondcivitanoj strebas por organizado de paco kaj sekureco kaj por plibonigo de homaj vivkondiĉoj. Por nova organizado de la mondo necesas tutmondaj institucioj, kiuj arbitracios la konkurencon en la internaciaj rilatoj kaj posedos realan kaj bone difinitan povon, por ke iliaj decidoj estu plenumitaj kaj kontrolitaj de reprezentantoj de la popoloj.

La raporto de s-ro G. Tellier vekis grandan intereson kaj iuj ĉeestantoj ekdeziris fariĝi mondcivitanoj.

Dimitar MUTUŠEV

NOVAĴOJ EL PLOVDIV

Konstanta estas la agado de plovdivaj esperantistoj, ĝi ne ĉesas eĉ dum la someraj tagoj. Ĉiumerkrede en la E-kulturdomo ili havas la eblecon aŭskulti interesajn prelegojn aŭ informojn, ĉeesti festajn vesperojn, celebri siajn plej multgaĝajn gesamideanojn. Oni ne preterlasis la naskiĝtagojn de meritaj, estimataj: Ivan Sivarov - kies aĝo (90) koincidas kun la aĝo de societo "Kulturo"; Anka Prahova-Pehlivanova (85), kies hobbio estas tradukado de historiaĵoj; la modesta versfaranto Hristo Dodov (80). Al ĉiuj oni esprimis sincerajn bondezirojn kaj estimon.

Antaŭ du jaroj estis fondita en Plovdiv nova societo Amika Rondo Esperantista (ARE). Antaŭ nelonge ĝiaj membroj realigis en la E-kulturdomo vesperon de "songazeto", kiu renkontis la aprobon de la aŭskultantoj. En ĝi partoprenis: Fani Miĥajlova, Rosica Rajeva, Zdravka Bogdanova, Veselina Kurteva, Atanas Cokov. En la kuranta jaro Bulgario perdis unu el siaj plej grandaj poetoj - la ŝatatan Elisaveta Bagrjana. En ARE naskiĝis la ideo organizi omaĝe al ŝi belartan vesperon (la 26-an de junio j.k.). Por la programo estis elektitaj versaĵoj, kiuj karakterizas la mondkoncepton, la pensojn kaj sentojn de la poetino. Ties prezento kaŭzis la plezuron kaj plenigis la korojn de ĉeestantoj per la beleco de ŝia poezio. Recitis: Veselina Kurteva, Lilia Sotirova, d-rino Stefka Stamatova.

Veselina KURTEVA

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

La Redakcio de revuo "BE" enkondukas sur la paĝoj de la revuo novan rubrikon "Esperanto en la praktikon". En tiu rubriko ni deziras aperigi materialojn de aktivaj esperantistoj, kiuj utiligas Esperanton ne nur por siaj bezonoj: korespondado, legado de libroj kaj gazetoj, aŭskultado de Esperanto-radioelsendoj k.a., sed precipe utiligo de la lingvo je servo de pli aŭ malpli da neesperantistaj grandaj homamasoj kaj instancoj.

Ĉi-sube ni aperigas la unuan tiaspecan materialon. Ni alvokas niajn legantojn sendi al ni tiaspecajn materialojn, kiujn ni volonte aperigos.

IMITINDA APLIKADO DE ESPERANTO EN ZAGREBO

En urbo Zagreb (Jugoslavio) ekde 1959 aperas sindikata, 16-paĝa, riĉe ilustrita gazeto "ZET". Ĝin eldonas la sindikato de la tramlaboristoj en tiu ĉi urbo. Delonge en la gazeto Esperanto praktike ĉeestas kaj estas uzata por la celoj kaj la bezonoj de la gazeto. Foliumante la gazeton la leganto turnas grandan atenton al la rubriko "Tra la vasta mondo", kiu kutime konstante aperas sur p. 14. En la rubriko aperas artikoloj, sciigoj, informoj k.a. materialoj pri la urbaj transportoj en multe da landoj. Tiuj materialoj ofte estas akompanataj de fotografajoj, skemoj, desegnaĵoj, emblemoj k.a. ilustraĵoj. Ĉion aperintan en tiu rubriko la redakcio ricevadas de siaj multnombraj korespondantoj, kiuj troviĝas en diversaj partoj de Esperantio. Ili ĉerpas la materialojn el lokaj urbtrafikaj gazetoj kaj revuoj tradukante ilin en Esperanton. Ricevinte la korespondantojn de siaj alilandaj korespondantoj la redakcio de "ZET" tradukas kroatlingven kaj aperigas ilin.

En ĉiu numero de gazeto "ZET" aperas ankaŭ alia rubriko "Esperanto". En ĝi la redakcio aperigas koncizan resumon en Esperanto de la plej gravaj materialoj aperintaj en la numero de la gazeto. Jen kelkaj titoloj de tiaspecaj resumoj: "Ni defendu nian Kroation", "Protekto de ŝoforoj", "ZET ne kulpas", "Zagrebo kiel ekzemplo", "Sango el Pula" k.a. Se iu deziras ricevi en Esperanto la tutan artikolon, kiu estas resumita, li devas turni sin al la redakcio.

Ambaŭ rubrikojn tre lerte kaj profesie prizorgas samideanino Marija Beloŝeviĉ, Miŝkinina 130, YU-41000 Ĉmomerec, Jugoslavio. Ŝia peresperanta agado meritas subtenon. Ĉiu el ni povas traduki koncizajn materialojn el nacilingvaj periodaĵoj pri urba transporto kaj sendi ilin al s-ino Marija Beloŝevic.

La kunlaboro de la esperantistoj en Zagrebo kun la redakcio de gazeto "ZET" estas vere imitinda. Tiurilate povas sukcese agadi la bulgaraj ĵurnalistoj-esperantistoj, kiuj estas kelkdekoj. Ili tion povos des pli bone organizi kaj fari, se la sekcio de la ĵurnalistoj esperantistoj ĉe Bulgara Esperanto-Asocio reaktiviĝus kaj agus ankaŭ organizite en kadre de Asocio de Bulgaraj Ĵurnalistoj.

Nikola NIKOLOV

"Min obsedas la liriko..."

100 jaroj de la naskiĝo de Nikolaj Hohlov

Kiam mi analizas la originalan Esperantan literaturon ŝajnas al mi, ke la procesoj en ĝi similas al tajdo. Dum jaroj en nia literaturo regas klamo kaj poste subite venas novaj aŭtoroj kun novaj ideoj, verkoj, kiuj ne nur modernigas, sed riĉigas nian literaturon.

En la jaro 1891 naskiĝis tri eminentaj Esperantaj poetoj - Kalman Kalocsay, Julio Baghy kaj Nikolaj Hohlov. En diversaj jaroj ili komencis lerni la Lingvon Internacian, Hohlov en 1905, Baghy en 1911 kaj Kalocsay en 1913, sed preskaŭ samtempe ili debutis en la originala Esperanta literaturo kaj iliaj poemoj difinis la karakteron de nia originala poezio inter la du mondmilitoj.

La granda tajdo en nia literaturo komenciĝis en la dudekaj jaroj. Tiam aperis la unuaj signifaj Esperanto-poemoj, kiuj anoncis la renesancon de nia poezio kaj kiuj signis la periodon, kiam, kiel diris William Auld: "la diletantismo definitive malaperis el nia poezio".

En 1921 aperis "Mondo kaj koro" de K. Kalocsay, en 1922 "Preter la vivo" de Julio Baghy kaj dum tiu ĉi tempo Nikolaj Hohlov aktive tradukis kaj verkis originale. Tiam Hohlov loĝis malproksime de Budapeŝto, de la granda Esperanta kultura kaj literatura centro, sed li sentis sin forte ligita al la Budapeŝta Esperanta Skolo.

Nikolaj Hohlov naskiĝis en Moskvo, sed bedaŭrinde oni ne scias la precizan daton. Li finis ekonomiajn sciencojn kaj laboris kiel supera ekonomiisto ĉe industria trusto. Liaj Esperanto-verkoj aperis en "La Ondo de Esperanto", "Konkordo", "Literatura Mondo", "Heroldo de Esperanto", "Esperanto" kaj en aliaj revuoj.

Hohlov apartenas al la plej aktivaj Esperanto-tradukistoj kaj tradukis el angla, rusa kaj serba lingvoj. Pli gravaj liaj tradukoj estas "Krucumo" de Drozdov, kiu aperis en 1922, "Orientaj fabeloj" de Doroŝeviĉ - 1928, "La morto de Danton" de Aleksej Tolstoj - 1928, "Historio de la Mondlingvo" de Drezen.

Nikolaj Hohlov estas el la unuaj Esperantaj dramverkistoj kaj lia komedio "La morto de deligitito de UEA" - 1924, ĉerpas eventojn el la tiama Esperanto-movado.

Malgraŭ sia aktiva Esperanta kreado kiel ĵurnalisto, kritikisto, tradukisto, Nikolaj Hohlov restos en la Esperanta kulturo kiel unu el la plej elstaraj poetoj. Dum sia mallonga vivo, li forpasis en 1953, li sukcesis eldoni nur unu memstaran poemaron "La tajdo", kiu aperis en 1928 en Koln, Germanio.

"La tajdo" tamen elokvente atestas pri talenta poeto, kiu vere venis diri jon novan kaj originalan al la Esperanto-legantoj. Ĝi aperis en tempo, kiam en la originala Esperanto-poezio eksonis pluraj novaj voĉoj de talentaj junaj poetoj. Kiel tajdo la poemaro alportis novajn ideojn, motivojn, sentojn,

kaj kiel trafe diris Hohlov mem:

*Kaj ŝanĝas sin en ĉiu kora tremo
La kanto de l' batalo kaj kviet'
Kaj tajdas en la sango la poemo
De l' krea kaj eterna Prapoet'
("La tajdo")*

Kiam temas pri la poezio de Hohlov, ĉiam la unua poemo, kiu eksonas en mi estas "Vintra fabelo". Laŭ mi ĝi estas la plej karaktera lia poemo, ĉar ĝi enhavas la ĉefajn trajtojn kaj sugestojn de lia poezio, kiu impetas, kaj kies bildoj kaj detaloj ne estas senmovaj.

*En fabelo kaj sen celo rotacias karuselo
De la sentoj en la kor',
Hej, rapide kaj senbride flugi ien, flugi fide
Kun favoro de Amor'!*

La diversaj Esperantaj literaturkritikistoj el diversaj vidpunktoj analizas la poezion de Hohlov. Ekzemple Wilfred Johnson emfazas la socialajn motivojn en lia poezio kaj li konkludas: "Tamen ŝajnas nun, ke la sociala konscienco de Hohlov venkis lian lirikismon". Similan opinion esprimis K. Kalocsay en "Skizo de Esperanta literaturhistorio" publikigita en "Gvidlibro por supera ekzameno", kie li skribas: "Hohlov ŝajnas poeto-profeto kun forta sociala sento kaj brula zorgo pri la sorto de la homaro." Tamen alia elstara Esperanta literaturkritikisto Lajos Tarkony opinias, ke Hohlov estas antaŭ ĉio lirika poeto, en kies poezio vibras "delikata, sed intensa erotiko".

Laŭ mi en la poezio de Hohlov ni trovas ideojn kaj konstatojn, kiuj ege aktualas eĉ nun, post pli ol sesdek jaroj. Profete kaj majeste sonas la versoj en la poemo "Eŭropo". Eŭropo, la kontinento, kiu ĉiam devis direkti la kulturon kaj la ekonomian progreson de la homaro, dum jarcentoj dronis en krimoj, stertoroj, veoj.

*Analojn, postlasitajn de gentoj kaj prauloj,
Mi sentas en angoro tra tempoj kaj nebuloj,
Antikvaj krimoj pete al mi etendas manojn
Kaj forgesitaj lingvoj malbenas la tiranojn.*

Tamen jam estas tempo, kiam Eŭropo devas ekludi sian veran rolon kaj proklami pacon, liberon, kunlaboron. Hohlov estas optimisto, kiu kredas, ke malgraŭ ĉio, tiu ĉi tempo venos. Mi nevole demandas min: "ĉu vere?", sed mi same deziras kredi kiel li.

*Tempestas la mistikaj abismoj de l' animo,
Sed jam vidiĝas lumo en nova malproksimo:
Obee donas vojon laciĝo kaj miopo
Al kredo je l' estonto de la patrin' - Eŭropo.*

En la poezio de Hohlov ni rimarkas same filozofiajn problemojn kaj tre trafe la poeto esprimas la eternajn konfliktojn en la homa animo. Tutan vivon la homo strebas al anima ekvilibro, al harmonio kun si mem, kun la naturo, kun la tuta mondo, sed

ege malfacile li sukcesas atingi tiun ĉi benitan revan celon.

*Sur montoj kreskas mia sorĉa floro,
sed en la valoj kuŝas mia pan',
Altiras la animon ĉiu floro,
sed ankore tenas ĝin la karna man'.*
("Mia vojo")

La literatura portreto de Nikolaj Hohlov, malgraŭ konciza, ne estus plena, se mi ne menciis liajn intimajn ampoemojn en kiuj vere vibras delikata erotiko kiel diris Lajos Tarkony.

*Jen - ĝi brilas mia luno,
Virgomaska amlucerno,
Nuda mammo el latuno,
Iritilo de l' eterno.*
("La luna ebrio")

Ni recenzas

Ek al leg'! Legolibro por perfektigo en Esperanto (duvoluma), kompilis: Hektor Alos; Kiril Velkov. Redaktis: Ljubomir Trifonĉovski. Eld.: Bulgara Esperanto-Asocio, Sofio, 1991, broŝ., 87 + 195 pĝ., 14,5 cm x 20 cm, sen ISBN. Prezo neind.

Kion celas la verko? Tion la subtitolo jam indiketas ("legolibro por perfektigo en Esperanto"), sed la kompilintoj trafe precizigas en la enkonduko: "nia emo estas iel tuj helpi la iniciatemajn instruistojn kaj memlernantojn per modernaj altnivelaj internaciaj materialoj nepre simplaj por perfektigo lingva kaj stila". La unua kajero (tiel la kompilintoj ĉinmodeste nomas la unuan volumon) celas "provoki la esperantistojn eklegi", dum la dua "jam havas la taskon profundigi la sciojn pri la originala Esperanta literaturo kaj tiel riĉigi la vortprovizon".

Tiucele kaj tiutaske la kompilintoj eltroveme kunmetis buntan mozaikon da 207 tekstoj de 77 aŭtoroj el 29 nacioj. La temoj ege varias, samkiel la verkstiloj: primovadaj artikoloj, literaturaj eseoj, historiaj studoj, poemoj plej diversaj, rakontoj, noveloj, romanfragmentoj, kaj eĉ rara ekzemplo de poezia prozo (cetere, unu el la plej belaj tekstoj nialingvaj, el la brila plumo de Edmond Privat). Kvankam enestas ankaŭ kelkaj klasikaj, ĉi tiun verkon ne makulas la kutima ŝimo de antolo-

EK AL AĈET'!

gioj kaj krestomatiaj, ĉar ĝi estas alia, ĝi estas io tute nova, unika: temas ja pri legolibro moderna, aktuala, freŝa, multtema, bunta, mozaika, stilriĉa, kie troveblas ne nur literaturaj ĉiuepokaj (ekde Zamenhof ĝis la plej ĵusaj talentuloj, kiel Georgo Kamaĉo), sed ankaŭ utilaj informoj pri diversaj movadaĵoj (Pasporta Servo, biografio de Zamenhof, historio de Esperanto k.a.). La unuaj tekstoj, eltiritaj el la konata gazeto **Kontakto**, estas verkitaj en facila, "radiklista" stilo, sed la vortprovizo iom post iom ampleksiĝas tra la verko, samkiel la ĝenerala stilo. Ĉio por ĉies gusto, leginvite, legincite, leginstige, laŭ la titola ekkrio. Interplektiĝas poemoj kaj prozaĵoj, en harmonian kombinaĵon, kaj la tekstojn de ĉiu aŭtoro antaŭas kurta sed trafa biografio noto, kie ne mankas interesaj prijuĝoj, kompreneble iom subjektivaj.

Malgraŭ la ĉi-supraj kvalitoj, evidentas, ke la verko kompiliĝis iom haste: i.a. mankas laŭalfabeta listo de la aŭtoroj, forgesiĝis indiko pri la nomo de la ilustrinto. Krome pridiskutindas la enmeto kaj preterlaso de iuj aŭtoroj: laŭ mi tro abundas Pironaĵoj, ĉiam samkliŝaj, kaj mankas ekzemploj de la t.n. Praga skolo, kiuj legindus kun vortklarigaj piednotoj; kelkaj tekstoj (ekzemple la **Vesperkanto** de H. Adamson, plej lama poemo de mallerta poeto) tute ne meritus enviciĝi en la spaliroj de **Ek al**

Nikolaj Hohlov estis granda promeso en la originala Esperanta poezio. Liaj poemoj atestas pri poeto, kiu bonege regas la ritmon, esprimas siajn pensojn en sonaj tintaj strofoj kaj vere lin tute obsedis la liriko. Tamen Hohlov ne sukcesis plene disvolvi sian talenton. Ne ĉiuj liaj poemoj ravas, sed lia rolo en la originala Esperanto-poezio estas grava kaj signifa, ĉar lia poezio same preparis la vojon por la sekvaj Esperantaj poetoj, kiuj atingis tion, al kio Hohlov sincere kaj tutkore strebis, var-tante ame la flameton de nia juna poezio.

Georgi MIHALKOV

leg'!, escepte se oni volus ilin prezenti kiel malimitendajn "modelojn"; miriga estas ankaŭ la manko de eroj el **La infana raso**, la plej fajna perlo de nia literaturo...

Tamen la verko estis necesa. Oni bezonis ĝin en la nuna instrusituacio en Bulgario. La kompilintoj rezonis Zamenhofe: "pli bone tuj ovo ol poste (aŭ eĉ neniam) bovo"; kaj ekagis; kaj traserĉis; kaj kompilis; kaj persistis malgraŭ la forbrulo de la biblioteko de unu el ili; kaj eldonis; kaj disdonis; kaj recenzigis. Jen do! Disponeblas nun en la merkato utilega legolibro, taŭga ne nur en Bulgario, sed ĉie kie oni volas kaj emas plulerni, perfektigi, kulturiĝi, edukiĝi en Esperanto. Internaciigon kaj disfamiĝon de la verko jam signas ĝia ĵusa adopto en la Budapeŝta ELTE-Universitato kaj en la San-Franciska Ŝtata Universitato. Certe aliaj sekvos. Atendindas do nova eldono, sena je koboldoj, kun pli inda vesto, post rapida elĉerpiĝo de la nuna. Dume, ek al aĉet'!

Gonçalo NEVES,
Portugalia

Noto de la Redakcio: Ni uzas la okazon gratuli nian portugalan kunlaboranton Gonçalo Neves pro la ricevita premio "Nova Talento" de la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj de UEA.

ORIGINALA VERKO PRI TRADUKARTO

TRADUKARTO de Venelin Mitev. Redaktis kaj la antaŭparolon verkis G. Mihalkov. Broŝ., 115 p., 20 x 14,5 cm, Bulgara E-Asocio, 1991. Prezo: 12 lv.

Nia konata Esperanta tradukisto Venelin Mitev (kiu tiel entiriĝis en la tradukadon, ke preskaŭ forgesis pri kreado de propra originala aŭ nacilingva poezio) publikigis interesan ribron kun la elokventa titolo "Tradukarto".

La temo pri la tradukarto estas tre komplika kaj tamen nepre prilaborenda, malgraŭ ke ekzistas nemal multe da verkoj pri tiu problemo. La aŭtoro eĉ citas multloke en sia libro saĝajn opiniojn de esperantistaj kaj neesperantistaj aŭtoroj traktantaj en siaj verkoj la kontraŭdirajn taskojn de la tradukistoj. Konsentante kun multaj aliaj opinioj, Venelin Mitev tamen verkis tiel, ke liaj rekomendoj al la tradukistoj /tradukantoj estu plej proksimaj al la taskoj nome de la esperantistoj, kiuj okupiĝas pri prezento de bulgarlingvaj elstaraj aŭtoroj. En la koncernaj eseoj de la libro li ilustras siajn teoriajn kaj praktikajn tezojn per multaj sukcese elektitaj ekzemploj el nialanda literaturo. Li utiligas ankaŭ la metodon de komparado prezentante tradukojn de samaj verkoj far malsamaj tradukistoj. La subtila analizo de pozitivaj kaj negativaj en tiuj tekstoj plifaciligas la tradukontojn eniri pli profunde la "sekretojn" kaj "magion" de tradukarto. Tio aparte validas por la estonta agado de bulgaraj esperantistoj sur la kampo de la tradukado. La analizado helpas al multaj novaj kaj nespertaj tradukantoj estiĝi kapablaj tradukistoj (aŭ simple rezigni tiun heroecan laboron, se ili konvinkiĝus, ke la pezo de tradukado ne estas elportebla por ili).

Venelin Mitev okupas en tiu libro la pozicion de gvidanto de rondo por tradukarto. En libera, preskaŭ konversacia aŭ memuara formo, li traktas la tradukistajn problemojn. Tiamaniere la uzanto de la libro facile konceptas la tutecan pozicion de la aŭtoro pri la postuloj de la tradukar-

to. Li kvazaŭ amike invitas vin eniri la "laboratorion" de liaj propraj traduklaboroj kaj intime klarigas al vi kiel traduki.

Finfine la aŭtoro insistas, kiel aliaj antaŭ li, ke estas nepre valida la aserto: "la bona tradukisto estas kreanto". Sen propra tradukista talento eĉ la plej perfekta esperantisto ne povus fariĝi kvalifikita tradukisto. Iu povas diligente legi multajn librojn pri tradukarto, parkerigi ĉiujn rekomendojn de plej gravaj aŭtoritataj specialistoj, labori ŝvitante je la frunto, tamen ne atingi eĉ kontentigan rezulton en siaj tradukokupoj. Sentalenta tradukisto ne povas proksimiĝi al la nivelo de originalo, ne kapablas ĝin digne prezenti al la esperantista publiko.

Venelin Mitev insistas diversloke en sia libro pri la neceso de fundamenta kono pri la tuteca verkaro de la tradukota aŭtoro, pri konkretaj apartenaĵoj de la ĵutempa literaturo ktp. Sendube, tiu maksimumo postulata de la tradukistoj estas tre grava por la sukcesa traduklaboro. Estas ja ege malfacile akiri sufiĉe da similaj konoj, sed labori ĵudirekte nepre necesas, kiel ankaŭ utiligi la sperton de altnivelaj tradukistoj kaj lerni el ties atingoj.

Mi persone estas tute konsenta ankaŭ kun la postulo de Mitev pri libera, ne laŭvorta tradukado. Kompreneble en la komenco ĉiu faras erarojn sub la influo de la gepatra lingvo. Tamen la insistita laboro pri proprigo de logika kaj flua E-stilo helpas la tradukiston, memorante la konsilojn de la aŭtoro, trovi la vojon al transigo de pensoj, emocioj kaj spirito de koncerna aŭtoro laŭ la leĝoj de la internacia lingvo (kaj inverse, se oni tradukas el Esperanto al la bulgara).

Ne enirante detalojn, mi tamen dezirus fari kritikan noton al la eldonisto: pli grandan precizecon en la korektado, precipe en similaj verkoj, kie eĉ la erara ŝanĝo de iu litero povus damaĝi la ĝustan komprenon de la aŭtenta aŭtoro pozicio.

Nikola ALEKSIEV

POROKAZA E-STAMPO

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) organizis unuan fojon en sia historio sian kongreson en Ĉeĥoslovakio. Temas pri 43-a kongreso de IFEFF, kiu okazis en moravia urbo Olomouc inter la 11-a kaj 17-a de majo, kiun partoprenis preskaŭ 400 esperantistoj el 21 landoj. En la periodo post la Dua Mondmilito tio estis la plej granda kaj plej internacia Esper-

anto-aranĝo sur teritorio de nuna Ĉeĥoslovakio.

Poŝtoficejo en urbo Straznice honoris tiun ĉi menciitan 43-an IFEFF kongreson per porokaza E-stampo kun ĉeĥa teksto: "43-a internacia kongreso de esperantistoj fervojistoj 11.-17.5.1991 Olomouc".

Dum la menciita 43-a IFEFF kongreso uzadis poŝtoficejo Olomouc

2 rekte en kongresejo porokazan E-maŝinstampilon kun teksto: "43-a IFEFF kongreso 11.-17.5.1991 Olomouc Ĉeĥoslovakio".

Ambaŭ menciitajn E-poŝtstamponojn eblas ankoraŭ aldona akiri ĉe adreso: ESPERANTO, poŝtkesto 34, CS-696 62 STRAZNICE, Ĉeĥoslovakio.

**Vláda HASALA,
estranano de ĈEA**

MIGJENI

(1911-1938)

Ĉi-supra nomo de la aŭtoro estas formita el la unuaj du sonoj de la plena nomo de la albano: Millosh Gjergj Nikolla.

Poeto kaj prozverkisto, distingita reprezentanto de la demokratia kaj revolucia literaturo inter la du mondmilitoj. Sur la fundamento de lia verkaro kuŝas granda deziro pri nova mondo, kie la popolo vivu libera kaj feliĉa.

Tial tutan lian verkaron karakterizas aktiva humanismo. La plej bonaj herooj de liaj verkoj estas senlaboruloj, kiuj klopodadis tutan tagon gajni pecon da pano, montaranoj, kiuj suferas veran malsaton, mizeruloj forlasitaj de la socio, kiuj ne ĝuas eĉ unu feliĉan tagon.

MALPERMESITA POMO

Iu tridekjarulo, senlabora, staras kontraŭ filmreklamajoj, kvankam estas labortago. Pfu! - li kraĉas kaj levas sian kapon el la reklamajoj. Ŝajnis al li, ke iu lin vokas... Sed ne. Neniu lin vokas. Neniu bezonas laboriston. Kaj li trankvile daŭrigas sian ĉiutagan laboron: rigardas filmreklamajojn.

- Pfu! Ĉi tiuj ĝuas la vivon - li diras kaj proksimiĝas por pli preciza studo. Estas ĉiutaga filmo: bela junulino kaj apud ŝi belulo. Envio en la okuloj de laboristo. Envion sentas je la protagonisto. Rigardas lin malfavore. Kraĉas. Rigardas siajn ŝuojn. Ne scias eĉ kio li mem estas. Enkarniĝo de ŝuoj: ŝuaĉoj. Kliniĝas kaj streĉas ŝuaĉon je ŝnureto kaj ellasante "eeeh" sin levis. Iru sur la trotuarojn, kompreneble. Ankaŭ nudpiede povas marŝi sur trotuaro, ĉu ne!

Li moviĝas malrapide, trankvile. Kiel senlaborulo. Ankaŭ aliaj marŝas, sed ne silentaj - maltrankvilaj. Kiel bonas esti trankvila, marŝi malrapide, kiel riĉulo. Sed, kion mi diras? - Ĉu estas bone marŝi malrapide kaj trankvile... Ne, kaj jes! Jes, kaj ne! Laŭ kazo... Por riĉulo estas bone marŝi malrapide, ĉar digestiĝas manĝaĵo. Por laboristo ne estas bone marŝi malrapide. Kial? - Vi ĝin scias. Sed nia laboristo marŝas ĉiam malrapide, plenkompforte, trankvila. Mi similas tute riĉulon. Kion fari? Tia estas ĉi tiu tempo... ankaŭ ĉi tiu mondo. Eĉ se vi ne deziras esti riĉulo, fariĝas riĉulo. Nia laboristo ne deziras esti riĉulo, nek imiti riĉulojn, sed la tempo!... Al li ne plaĉas. Ne plaĉas al li tia riĉuleco. Ne pro malĝojo, sed ankaŭ ĉi tion vi scias.

Tan-tan-tan-tan! Kvar horoj posttagmeze! Kiom kruele ili pikas la stomakon de la laboristo. Kvar horoj sonas el la sankta sonorilejo kaj eĥas ĉe la stomako de la laboristo. Kvar! Kvar! Kvar! Ĉie kvar! Kial kvar? Kial? Kial kvar? Disputo. Ekbatalo. Iu kvazaŭ revolucio. Revolucio en miniaturo. Tondras kanono... Ne!... Stomako pro malsato.

Nia laboristo plu pasas tra la stratoj de la urbo. Serĉas laboron. Kiel siaj kolegoj en Berlino



kaj Londono. Nenie estas ĉaro plena por ĝin malŝarĝi. Nenie estas vojaĝanto kun valizo enmane por lin helpi. Nenie. Neniu deziras lian ŝviton. Neniel oni povas gajni du aŭ tri mone-rojn.

Haltas laboristo antaŭ la vendejoj kaj rigardas tra la vitroj. Rigardas kaj gustumas romanti-kon hodiaŭan. Antaŭ la vitroj de papervendejo: ree artistoj! Li kunpremas dentojn. Pro kole-ro la pugnoj leviĝas alten por unu celo... sed la leĝo! La policano! Ĉi tion al li memorigas la cerbo. Li malestime lasas artistojn. Kraĉas. Pluiras. Denove kraĉas. Rigardas dekstren kaj mal-dekstren. Kaj kraĉas. Malsata kaj kun disŝiritaj vestoj iras malrapide, apud vendejoj plenple-naj de "malpermesitaj pomoj".

Instinkta volo deziras aperi. Nia laboristo regas sin mem. La leĝo! La policano! Pro sekure-co li malantaŭen metas la manojn. Kaj liaj manoj estas fortaj, tre fortaj. Ankaŭ diablon ili ekkaptus je kolo kaj mortigus. Sed ankaŭ la diablon protektas la leĝo.

Tan-tan-tan-tan-tan. Ĝis kiam tiel?

Tradukis: Gafur MUĈO

Belartaj konkursoj de UEA en 1992

UEA denove invitas verkemajn esperanti-stojn partopreni en la Belartaj Konkursoj, kies fono ĉi-foje estas aparte alloga; ja la rezultoj estos anoncitaj en Vieno, unu el la mondaj ĉefurboj de kulturo kaj arto.

La konkurso konsistas el sep tradiciaj branĉoj kaj, eksperimente por la dua fojo, el vidbenda branĉo. La premiaj monsumoj estas plialtigitaj.

La konkursaĵoj de ĉiuj branĉoj devas esti novaj kaj (escepte de la infanlibroj) ne publi-kigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpos-pacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma ludodaŭro ne fiksitaj. Tri premioj.

Eseo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Longo ĉirkaŭ 400 x 65 tajpospacoj.

Premio Luigi Minnaja (unu).

Kanto: Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio An-okin (unu).

Fotografio: Temo ligita kun Esperanto aŭ kun tiu de la UK en Vieno. Tri premioj.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ traduki-ta libro aperinta en 1991. Unu premio.

Alsendo de la konkursaĵoj: La konkursaĵoj

por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto estu senditaj en kvar ekzempleroj al: Belartaj Kon-kursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Ili devas alveni **plej malfrue la 31-an de marto 1992**. Por fotografio kaj vidbendo oni sendu po unu ekzempleron al tiu adreso por alveni plej malfrue la 1-an de julio 1992. Por la branĉo de infanlibroj la eldonejoj sendu po tri ekzemplerojn de la libro al la sama adreso.

La konkursaĵoj portu indikon pri la branĉo, por kiu ili estas celitaj, kaj (escepte de vidben-doj kaj infanlibroj) estu signitaj per pseŭdoni-mo. En aparta koverto estu enfermita la vera nomo kaj adreso de la konkursanto. Oni aldo-nu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkuras.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de pre-miita verko apartenas al UEA. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝin senpage okaze de eldono de antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke tiu aperu kun la aprobo de UEA.

Premioj: Unua premio 360 gld.; dua 252 gld.; tria 144 gld. Premio Luigi Minnaja ĉ. 300 gld. Premio An-okin 360 gld. Premio Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 252 gld. plu enskribo sur la pokalon Henry Harabagiu. Infanlibro de la Jaro 756 gld. Ĉiu premiito ricevos diplomon.

Detala regularo haveblas ĉe la supra adreso kontraŭ unu respondkuponon.



Todor ŠOŠEV

AL MIA PANJO

*Tie, for, en Sveĵen panjo sidas sola! -
Kiel bird' maljuna - trista, senkonsola!
Siajn etajn idojn vane ŝi atendas!
Pro forflug' ilia el la nest' ŝi plendas!*

*Ege mi sopiras tien jam reveni!
en gepatra hejmo panjon ĉirkaŭpreni!
Volas mi, ke panjo varme kaj sen ĉeso
per tremantaj manoj milde min karesu!*

*Ŝi min ree kisu kun feliĉa ploro,
pri junec' viviĝu fora rememoro!
Mia kordoloro jam tuj fordegelu, -
ne plu sola estu mi sub la ĉielo!*

FLORO

*En kampo jen libere kreskas ĝi -
flor' bela, kun agrabla bonodoro!
En manojn ĝin ne povas preni mi -
tre milda, delikata, freŝa floro!*

*Jes, neniigi ĝin ne volas mi,
eĉ tuŝi ĝin ne estas mi kuraĝa!
Eĉ kun sufer' dum mia nokt' sen ĝi
eterne sola vivos mi, sed saĝa!*

*Kaj kvankam pro angoro ĝemos mi,
la koro pro ĵaluz', dolor' suferos,
ĝojigu milojn da okuloj ĝi!...*

*En manoj, deŝirita, mortos ĝi
Ekstaze ĝin adori mi preferos!
Ĝi plue kresku kvankam for de mi!...*

Canko MURGIN

ODO AL ĴURNALISTO

Forpasis Ivan Dimitrov-Keremidĉiev
(1910-1991)

*La radaro
de l'homaro
ĵurnalisto estas -
li muzikas,
mozaikas
pri soci-tempesoj.*

*Li - sur monto -
klara fonto
al ĝardenoj fluas -
akvofalo
al centralo -
li salt-muĝe bruas.*

*Li - elektro
kvazaŭ spektro -
helas domoj buntaj
kaj arbare
ofte faras
seĝon de l'fi-trunkoj.*

*Per sputnikaj
komunikoj
li - herold' de l'vero:
rul-destino,
presmaŝino -
gazetar-rivero...*

*Televide,
tuj-rapide
li projektas bildon.
Li - radaro
de l'homaro -
li - libero-ŝildo.*

Por la kursoj de Esperanto

KONTAKTO-LISTO

En la novaj instru-programoj estas menciita Kontakto-listo. Kio ĝi estas? Se respondi koncize - eta frekvencvortaro (t.e. la plej ofte uzataj vortoj de iu lingvo). Ĝi aperis unuan fojon en la internacia junulara revuo "Kontakto".

En tiu listo troviĝas ĉirkaŭ 1000 radikoj (krom la numeraloj, pronomoj, korelativoj, afiksoj, tag- kaj monatonomoj, en ĝi ne prezentitaj). Preskaŭ duono de ili estas grase presitaj - tio estas la minimumo por unua grado, kaj la tuta listo estas por la dua grado.

abon-
aĉet-
adres-
aer-
afabl-
afer-
ag-
agrabl-
aĝ-
ajn
akcept-
akr-
aktiv-
akv-
al
ali-
almenaŭ
alt-
am-
amas-
ambaŭ
amik-
amuz-
angul-
ankaŭ

ankoraŭ
anonc-
anstataŭ
antaŭ
apar-
apart-
aparten-
apenaŭ
aper-
apud
aranĝ-
arb-
art-
artikol-
asoci-
aspekt-
atak-
atend-
atent-
ating-
aŭ
aŭd-
aŭskult-
aŭtobus-
aŭt(omobil)-
aŭtun-
av-
azen-

baldaŭ
ban-
bar-
bat-
batal-
baz-
bedaŭr-
bel-
best-
bezon-
bibliotek-
bicikl-
bier-
bild-
bilet-
bird-
blank-
blov-
blu-
bol-
bon-
bord-
botel-
bov-
brak-
bril-
bros-
bru-

brul-
brun-
brust-
buŝ-
buter-
buton-

cel-
centr-
cert-
ceter-
cigared-
cirkl-

ĉambr-
ĉapel-
ĉar
ĉe
ĉef-
ĉemiz-
ĉes-
ĉeval-
ĉi
ĉiel-
ĉirkaŭ
ĉu

da
danc-
danĝer-
dank-
daŭr-
de
decid-
defend-
dekstr-
demand-
dens-
dent-
desegn-
detal-
dev-
dezir-
di-
diferenc-
diferenc-
difik-
dik-
dir-
direkt-
disk-
diskut-
divers-
divid-
do
doktor-
dolĉ-
dolor-

dom-
domaĝ-
don-
donac-
dorm-
dors-
drat-
dub-
dum
dung-

eben-
eĉ
eduk-
edz-
efektiv-
efik-
egal-
ekonomi-
ekskurs-
ekspozici-
ekster
ekzamen-
ekzempl-
ekzerc-
ekzist-
el
elekt-
elektr-
en
energi-
erar-
esper-
esplor-
esprim-
est-
estim-
eventual-
evolu-

facil-
faden-
fajr-
fak-
fakt-
faktur-
fal-
fam-
famili-
far-
fart-
feliĉ-
fenestr-
fer-
feri-
ferm-
fest-

fiks-
fil-
film-
fin-
fingr-
fiŝ-
flag-
flank-
flav-
flor-
flu-
flug-
foj-
foli-
fond-
font-
for
forĝes-
fork-
form-
fort-
fos-
fot-
frap-
frat-
fraŭl-
fremd-
frenez-
freŝ-
frost-
fru-
frukt-
fulm-
fum-
funkci-
fuŝ-

gaj-
gajn-
gas-
gast-
gazit-
glaci-
glas-
glit-
grand-
gras-
gratul-
grav-
gren-
griz-
grup-
gust-
gvid-

ĝarden-
ĝen-
ĝeneral-
ĝentil-
ĝis
ĝoj-
ĝu-
ĝust-

ha
halt-
har-
haŭt-
hav-
haven-
hejm-
hel-
help-
herb-
hieraŭ
histori-
ho
hodiaŭ
hom-
hor-
horloĝ-
hotel-
hund-

ide-
ideal-
imag-
imit-
industri-
infan-
inform-
insekt-
insign-
instru-
insul-
inteligent-
intenc-
inter
interes-
intern-
invit-
ir-

ja
jam
jar-
je
jen
jes
juĝ-
jun-
jup-
just-

ĵet-
ĵus

kadr-
kaf-
kaj
kajer-
kalendar-
kalkul-
kamp-
kant-
kap-
kanabl-
kapt-

kar-
karb-
kart-
kased-
kaŝ-
kat-
kaŭz-
kaz-
ke
kelk-
kil(ogram)-
kilometr-
kis-
klar-
klas-
klin-
klopod-
klub-
knab-
kol-
kolekt-
koler-
kolor-
komb-
komenc-
komerc-
komfort-
komitat-
komisi-
kompar-
kompat-
kompren-
komput-
komun-
komunik-
kon-
koncern-
kondiĉ-
konduk-
konfes-
kongres-
konkret-
konsent-
konserv-
konsider-
konsil-
konsist-
konstant-
konstru-
kontakt-
kontent-
kontraŭ
kontrol-
konven-
konvink-
kopi-
kor-
korb-
korespond-
korp-
kort-
kost-
kostum-
kovert-

kovr-
krajon-
kre-
kred-
kresk-
kri-
krom
krue!
krur-
kudr-
kuir-
kuk-
kuler-
kulp-
kultur-
kun
kupon-
kur-
kurac-
kuraĝ-
kurs-
kuŝ-
kutim-
kuz-
kvadrat-
kvalit-
kvankam
kvant-
kvazaŭ

la
labor-
lac-
lag-
lakt-
land-
lang-
larg-
las-
last-
laŭ
lav-
leccion-
leg-
legom-
leĝ-
lern-
lert-
leter-
lev-
liber-
libr-
lig-
lign-
lim-
lingv-
lini-
lip-
list-
lit-
liter-
literatur-
loĝ-
lok-

long-
lud-
lum-
lun-

man-
manĝ-
manier-
mank-
mantel-
mar-
mark-
marŝ-
mastr-
maŝin-
maten-
material-
mebl-
medi-
mem
membr-
memor-
mend-
merit-
met-
metal-
metod-
metr-
mez-
mezur-
miks-
milit-
minus
minut-
mir-
modern-
mok-
mol-
moment-
mon-
monat-
mond-
mont-
montr-
morgaŭ
mort-
mov-
mult-
mur-
muŝ-
muze-
muzik-

naci-
naĝ-
nask-
natur-
naz-
ne
nebul-
neces-
neĝ-
nek
nep-

nepr-
neŭtral-
nev-
nigr-
nivel-
nokt-
nom-
nombr-
nord-
normal-
not-
nov-
nu
nub-
numer-
nun
nur

obe-
objekt-
odor-
ofic-
oft-
okaz-
okcident-
okul-
okup-
ol
ole-
onkl-
opini-
or-
ord-
ordinar-
ordon-
orel-
organiz-
orient-
original-
ost-
ov-

pac-
pag-
paĝ-
pak-
palp-
pan-
pantalon-
paper-
par-
pardon-
park-
parol-
part-
pas-
paŝ-
patr-
pec-
pen-
pend-
pens-
pentr-
per

perd-
perfekt-
period-
permes-
person-
pet-
pez-
pied-
pik-
pilkl-
plaĉ-
plafon-
plan-
plank-
plant-
plast-
plej
plen-
plend-
plezur-
pli
plor-
plu
plum-
plur-
plus
pluv-
po
poem-
poent-
poezi-
polic-
politik-
pont-
popol-
popular-
por
pord-
port-
post
postul-
poŝ-
poŝt-
pot-
pov-
praktik-
prav-
precip-
preciz-
prefer-
preĝ-
preleg-
prem-
premi-
pren-
prepar-
pres-
preskaŭ
pret-
preter
prez-
prezent-
prezid-
pri

princip-
printemp-
pro
problem-
produkt-
profund-
program-
progres-
projekt-
proksim-
promen-
promes-
propon-
propr-
prov-
prunt-
publik-
pun-
punkt-
pup-
pur-
puŝ-

rad-
radi-
rajt-
rakont-
rand-
rang-
rapid-
raport-
redakt-
reg-
region-
regul-
reĝ-
reklam-
rekomend-
rekt-
religi-
renkont-
respond-
rest-
revu-
rezult-
ricev-
riĉ-
rid-
rigard-
rilat-
rimark-
rimed-
ripet-
ripoz-
river-
riz-
rob-
roman-
romp-
rond-
roz-
rubrik-
ruĝ-
rul-

sag-
sak-
sal-
salon-
salt-
salut-
sam-
san-
sang-
sankt-
sat-
sav-
sci-
scienc-
se
sed
seĝ-
sek-
sekretari-
seks-
sekv-
semajn-
sen
senc-
send-
sent-
serĉ-
seri-
serioz-
serv-
sezon-
sid-
sign-
signif-
silent-
simil-
simpl-
sinjor-
sistem-
situaci-
skatol-
skrib-
soci-
soif-
sol-
soldat-
solv-
somer-
son-
spec-
special-
spedul-
spert-
spez-
spic-
spir-
sport-
staci-
star-
stat-
stel-
strang-
strat-

streĉ-
stud-
stult-
sub
subit-
sud-
suf-
sufiĉ-
sukces-
suker-
sum-
sun-
super
supoz-
supr-
sur

ŝaf-
ŝajn-
ŝanc-
ŝanĝ-
ŝat-
ŝerc-
ŝip-
ŝir-
ŝlos-
ŝnur-
ŝrank-
ŝtat-
ŝtel-
ŝtof-
ŝton-
ŝtrump-
ŝtup-
ŝu-

tabl-
tabul-
tag-
tamen
tas-
task-
taŭg-
te-
teatr-
tegment-
tekst-
telefon-
teler-
televid-
tem-
temp-
ten-
teori-
ter-
terur-
tim-
tir-
tond-
tra
tradici-
traduk-
traf-
trakt-

tranĉ-
trankvil-
trans
tre
trink-
tro
trov-
tru-
tuj
tuk-
turism-
turist-
turn-
tuŝ-
tut-

universal-
universitat-
urb-
util-
uz-

vagon-
valid-
valor-
varm-
vast-
vek-
ven-
vend-
venk-
vent-
ver-
verd-
verk-
vesper-
vest-
veter-
vetur-
viand-
vic-
vid-
vigl-
vilaĝ-
vin-
vintr-
vir-
viŝ-
vitr-
viv-
vizaĝ-
vizit-
voĉ-
voj-
vojaĝ-
vok-
vol-
volv-
vort-
vost-

zorg-

SUKCESA EKSPERIMENTO

Sveda Esperanto-Federacio aranĝis en aprilo 1989 teatran turneon por pola aktorino Jadwiga Gibczynska, kiu prezentis sian repertuaron en diversaj esperantistaj medioj en Svedio. Post tio aperis interesa iniciato de kulturĉefo de komunumo Högsby, Kerstin Rohdin, je efektivigo de ciklo da prezentaĵoj en Esperanto por svedaj gelernantoj. Ĉi tiu ideo de Kerstin Rohdin baziĝis sur sugesto de la ŝtata lerneja komisiono (SO), ke svedaj lernejoj enprogramigu diversspecajn agadojn porpacajn kiel instru-temoj. Evidentiĝis, ke tre taŭgus tiucele la teatraĵo de Gibczynska, kies temo estas la vivo post atomeksplodo. "Ĉu la nepoj nin benos?", inspirita de germana verko de Gudrun Pausewang, kaj esperantigita de Joachim Giessner ("La lastaj infanoj de Oldrovalo").

Prezenti esperantlingve ĉi tiun malfacilan literaturaron al la sveda junularo, kiu Esperanton ne konas, estis vere tre riska tasko. La aĝo de la spektintoj variis inter 10 ĝis 25 jaroj. La percept-niveletoj malsimilis. Estis ja necese ludi ne nur en popol-altlernejoj aŭ gimnazioj, sed ankaŭ en klasoj elementaj.

Tamen la afero sukcesis. Ebligis tion unue helpemo de la svedaj instruistoj neesperantistoj, kiuj anticipe legis al gelernantoj la libron de Gudrun Pausewang svede. Poste, sur ĉi tiun grundon jam iomete preparitan, envenis la teatra prezentaĵo. La spektakloj funkciis bone, ĉar - post mallonga enkonduko - Kerstin Rohdin sekvis la aktorin agadon per samtempa traduko.

El "Monato"

Ĉi - e - len al - tas la mon - ta - ro, sen - li - me vas - tas la kam -
pa - ro, ĉi - e - lo kva - zaŭ sil - kru - ban - do jen
es - tas mi - a pat - ro - lan - do. Ĉi - // - lan - do.

ĈIELEN ALTAS LA MONTARO

Muziko: Georgi SPASOV

Teksto: Mladen ISAEV

1. Ĉielen altas la montaro,
senlime vastas la kamparo,
ĉielo kvazaŭ silkrubando
jen estas mia patrolando.

2. Mi amas tiun vastan teron
samkiel panjon, la sinceran.
Ĉi tie karas la birdetoj
kaj ankaŭ kampe la herbetoj.

3. Mi ŝatas la bulgaran vorton
sur placo, strato kaj en korto.
Mi ŝatas niajn kantojn belajn
kaj ankaŭ la popolfabelojn.

4. Mi kiam vidas la montaron
kaj aŭdas plaŭdon de la maro,
kun bru' de Rilo kaj Pirino
ĝin ĉiam amos mi ĝis fino.

Tradukis: Ilija ANDREEV

BULGARAJ POPOLAJ AMAJ KANTOJ

AMATA MIA, AMATA

- Amata mia, amata,
se oni mortus pro amo,
mi estus ankaŭ mortinta,
sed ja nenio fariĝus
nur sensukiĝus kaj velkus.
Pro vi, bravulo, estiĝis
mi seka arba branĉeto,
seka branĉeto rozuja,
seka tigeto dianta,
seka tigeto ocima -
far viaj nigraj angoroj.
Kiel ni faru, bravulo,
por ni ambaŭ geedziĝu,
dividu kune la triston
kaj elsuferu ĝin kune!

BLANKA MI ESTAS, BRAVULO!

Blanka mi estas, bravulo,
mi tutan mondon lumigis,
ja unu Karlak nur restis
kaj ĝi ne estus restinta,
sed dronis en la nebulo.
En la nebulo - nenio,
nur iu blonda knabino
kaj iu nigra paŝtisto -
ludanta dolĉan ŝalmeton,
per ŝalmo vortojn diradis:
"Se geamantoj ne nuptos,
kiom da tempo angoros?"

Tradukis: Nikolao STRANĜANSKI

AMA SONETO

Vi ne pensu plu pri nia amo,
kara mia! Ne sopiru nokte!
Super ni la luno staras vokte
sub grandega sia ora ŝamo.
Kie restis niaj oraj tagoj
kaj la oraj horoj de l' vesperoj?
Nur la novaj versoj en kajeroj
montras klare ĉiam la zigzagojn!
Ne, ne restis inter ni fajreroj,
sed malvarma cindro de l' surprizoj;
Sentas mi maldolĉan artemizion
de la teraj kaj ĉielaj veroj.
Mia kara, mia vi ne estas
kaj honeste mia koro festas!

Nikolao STRANĜANSKI

STRANGAJ TESTAMENTAJ KONDIĈOJ

Antaŭ kelkaj jaroj en Londono forpasis iu Dickenson kun sufiĉe enviinda havaĵo. Li ne havis infanojn kaj la ĝojo de lia edzino estis grandega, sed ĝis la momento, en kiu estis tralegita la testamento.

"Ĉar mia edzino dum nia tuta komuna vivo neniam estis kontenta kaj ĉiam grumbladis kontraŭ mi, tekstis la testamento, mi volas puni ŝin kaj, se ŝi dezirus ricevi mian heredaĵon, ŝi estus devigita dum dekjara periodo ĉiun tagon pasigi sur mia tombo po du horojn en silento. Kontrolos mia fratino, kiun mia edzino malamamis pli ol ŝi meritas."

En iu urbeto en Norda Anglio riĉa bienposedanto devis dividi en sia testamento sian grandan havaĵon inter sia edzino kaj sia fratino, kiuj neniel amis unu la alian. Dum la lastaj jaroj ili eĉ ne parolis unu kun la alia. Jen pro tio li metis kiel kondiĉon por la ricevo de la heredaĵo la jenon: "Se ambaŭ miaj plej proksimaj viringoj deziras ricevi mian havaĵon en mono kaj bienoj, kiujn mi lasis, ili estas devigataj unu monaton ĉiujare loĝi en unu domo, ses fojojn poste gastigi unu ĉe la alia, ĉirkaŭpreni unu la alian kaj interkisi."

Iu riĉa komercisto kun bona koro, konata en la socio, testamentis grandan sumon el sia havaĵo al iu vidvino pro "gesto", kiun ne ĉiu pritaksus. En sia testamento la forpasinto klarigas jene sian agon kaj tiun ĉi donacon-dankon: "Antaŭ 40 jaroj mi petis la manon de tiu ĉi virino. Ŝi rufuzis ligi sian vivon kun mi. Dank' al tiu ĉi rifuzo, mi ne edziĝis kaj pasigis mian tutan vivon kviete kaj silente. Mi sentas min morale devigita tiunmaniere malŝuldigi min al ŝi kaj mi dankas pro tiu ĉi bonaĵo."

Konstantin GALABOV
El la bulgara tradukis:
Dimitar HAĜIEV

AMO KAJ ĴALUZO

(Kaŭkaza popola legendo)

Mi kaj mia edziĝo faris nian kutiman promenon. Ni promenis en la ĉirkaŭaĵo de nia urbo. La pejzaĝo estis belega: la verdaj montoj Maŝuko kaj Beŝtaŭo altiĝis super la arbaroj kaj kampoj. Nia urbo dronis en floroj kaj verdaĵo. Sur la lazura ĉielo brilis la karesema suno.

La dimanĉa tago estis mirakla. Per la ŝnurvojo ni leviĝis sur la supraĵon de Maŝuko. Malproksime ni vidis la montojn de Kaŭkazo: jen tie estas la fortega Elbruso; tie - la belega Kazbeko, la ĉenoj de neĝoblankaj montoj plibeligis la sudan horizonton. Apude altiĝis la montoj de Pjatigorsko. Tio ĉi estas la montoj Juco, Ĵuco, Ĵeleznaja, Zmejko, kaj nia belulo Beŝtaŭo.

Ĉiuj montoj estas ekzotikaj kaj miraklaj. Longe ni admiris la mirindan pejzaĝon. Nun al ni aliris maljuna montano kaj demandis nin: "Ĉu vi scias la popolan legendon pri la granda amo de juna Maŝuko kaj kuraĝa Taŭo?"

Ni sidiĝis sur la benkon kaj ekaŭdis tre interesan rakonton de la saĝa maljunulo.

"Tio ĉi estis antaŭlonge. De maro ĝis maro en la tuta Kaŭkazo etendiĝis longaj ĉenoj de fortegaj grandeguloj - la Kaŭkazaj montoj. La belegaj montoj kiel la homoj amegis kaj malamamis, batalis por la vivo kaj pereis por la amo. Multe da herooj estis inter ili. Ili famiĝis en kruelaj bataloj, kiuj skuis teron kaj ĉielon.

Tre belega estis la juna Maŝuko. Seninterrompe interŝanĝis la belulino siajn festvestojn. Fruprintempe ŝi vestis sin en admirindaj vestoj el ĉielbluaj cejanoj, violaj iridoj, bluaj kampanuloj. Ŝi ĉirkaŭzonis sin per neĝblankaj bendoj el longharaj leontodoj. Ankoraŭ pli bela kaj pli sorĉa estis ŝia somera ornamvesto: la helaj floroj fantaziaj ornamis ŝian smeraldan robon kaj malhela verda ĉapeleto kronis ŝian ĉarman kapon. La bravulo atleto Taŭo rigardis kun plezuro la junan belulinon. Sub la ĉielo leviĝis supraĵo de Taŭo kaj neĝblanka turbano el nuboj ĉirkaŭprenis la kapon de ĝi. Forte ekamis la monta fortegulo la junan Maŝukon kaj ne povis vivi sen ŝi...

Subiĝis al li la koro de la fidela belulino kaj baldaŭ en la tuta Kaŭkazo preterkuris la novaĵo pri ilia gefianĉiĝo. Oni preparis sin al geedziĝa festeno, sed grandega malĝojo atendis niajn amantojn.

La belulinon Maŝuko delonge amis ankaŭ grizhara fortega Elbruso. Neatendita informo pri edziĝo de Taŭo kaj Maŝuko skuis kaj furiozigis la potenculon de montoj. Kuntiris la brovojn la kruela maljunulo, la brulega ĵaluzo ĉirkaŭkaptis lin. Al mortbatalo li defiis la junan atleton.

Ne ektimis la kuraĝa Taŭo. Li alvokis siajn amikojn por helpo kaj akorda armeo de montoj moviĝis kontraŭ maljunan grandegulon.

Tre malfacila estis la batalo por la vivo kaj amo.

Ĉe la bravega Taŭo ne sufiĉis la fortoj, por ke li povu venki la grizharan maljunulon. La fortega Elbruso per herkula bato de glavo dishakis la kapon de la junulo je kvin partoj kaj de tiu tempo ĝis nun oni nomas la junan Taŭo "Kvinkapa monto" aŭ Beŝtaŭo (en la tjurkaj lingvoj "beŝ" signifas "kvin" kaj "taŭo" - "monto").

Sed la maljuna Elbruso ne savis sin. Kolektinte la lastajn fortojn, la juna Taŭo batis la kapon de Elbruso kaj dishakis ĝin je du partoj. Kaj ĝis nun Elbruso havas du supraĵojn. En furiozo atakis la montpotenculo siajn malamikojn, detruis la amikojn de Taŭo kaj disĵetis ilin al la tuta Kaŭkazo. Ĉie kuŝis la faligitaj montoj. Apude kun Taŭo kuŝis liaj fidelaj amikoj Juco, Ĵuco, Zmejko k.a.

Sulkigis la frunton la grizhara Elbruso, surfruntigis sian longharan neĝan ĉapelon kaj poreterne li silentiĝis enkatenita en glacia blendo.

Ne elportis la pereon de la amata fianĉo la bela Maŝuko. Varmegaj larmoj elverŝiĝis el ŝiaj okuloj kaj ĝis nun ili fluas tra deklivoj de Maŝuko en formo de fontoj. Tio ĉi estas niaj mondfamaj kuracakvoj.

Bonvolu iri ĉiam al Maŝuko kaj sufiĉe satspiri la montan aeron kaj trinki kuracakvojn kaj vi estos eterne sana".

La montano finis sian rakonton. Kaj ni ankoraŭ longe sidis kaj silentis. La legendo emociis nin. Apude altiĝis la bela Beŝtaŭo, sube estis nia belega Pjatigorsko.

El la rusa rerakontis:
Viktor MOROZOV

Denove pri Esperanto

La 29-an de junio k.j. en Sofio okazis Nacia scienca konferenco-simpozio pri stenografia signosistemo. Antaŭ la kunveninta tiuokaze ege faka aŭskultantaro prelegis ankaŭ Petko Arnau-dov pri temo: "Unu internacia lingvo - unu internacia stenografio". Fakte li parolis pri la signosistemo UNESTENO kaj celante klarigi kelkajn ĝiajn specifojn, li devis prezenti iujn trajtojn de Esperanto. En la diskutoj oni interesiĝis kiamaniere en Unesteno oni signos diversajn esprimojn. Evidentiĝis, ke inter la tre bone konataj bulgaraj stenografoj estis 3-4 esperantistoj, pri kiuj nia Esperanto-publiko eĉ ne scias (krom unu el la organizantoj, docento Tonko Todorov, laŭprofesie matematikisto, sed ankaŭ esperantisto).

En la paŭzoj multaj manifestis intereson ĝenerale al Esperanto kaj al la eblecoj ĝin lerni kaj profesie uzi.

P. A.

22-a ĉefkunveno de IPTEA

La laŭvica, 22-a ĉefkunveno de IPTEA okazis je la 28-a de julio j.k. en Bergen, Norvegio - enkadre de la 76-a Universala Kongreso de Esperanto. Partoprenis poŝtistoj kaj telekomunikistoj el 7 landoj. S-ro Veikko Maki-Luopa, vicprezidanto de IPTEA el Finnlando, prezidis kaj f-ino Raymonde Perault el Francio sekretariis.

Post salutmesaĝoj de Bulgara kaj Franca IPTEA-Sekcioj kaj opinioj pri la E-situacio en la landoj de partoprenantoj precipe en la sfero de la poŝto kaj telekomunikado, s-ro Veikko Maki-Luopa prelegis pri la usona artpentristo Samuel Morse (1791-1872) okaze de la 200-jara datreveno kaj pri lia por la tuta mondo tre grava telekomunika inventaĵo de 1835, kiu estas konata kiel morsa telegrafo. Pro tio ankaŭ multaj radioamatoroj, kiuj kunsidis post la kunveno de la IPTEA en la sama salono, aŭskultis la prelegon. La morsa telegrafo estas la plej longe vivanta telekomunika inventaĵo. Estis menciite, ke la telefono fariĝis ĉi-jare "nur" 115-jara.

Okazis interŝanĝo de opinioj pri la estonta laboro de la Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-Asocio (IPTEA) kaj pri regula eldonado de ties presorgano "Interligilo".

La ĉefkunveno de IPTEA en Bergen pasis en tre amika kaj kolegia atmosfero.

Draguŝko PETROV

ALVOKO AL EKOLOGIEMULOJ

"La agado de la esperantistoj tiam estas plej efika, se ĝi kontribuas al la solvo de socie gravaj taskoj, taskoj kiuj respondas al la aktuala intereso de la homaro. La plej bona propagando por Esperanto estas ĝia sociutila apliko en neesperantistaj medioj." (El la E-libro "Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado".)

Ĉu vi konsentas pri tio? Do, ni alvokas unuopulojn kaj asociojn al kunlaboro. Kiel ĉiuj scias, Brazilo gastigos UN-Konferencon pri Mediprotektado kaj Disvolviĝo en junio 1992 en Rio de Janeiro. Pli ol 70 landoj jam konfirmis sian partoprenon. Tiu evento estos oportuna por prezenti Esperanton kiel komunikilon al la ekologiaj grupoj kaj partioj. Kredeble esperantistoj el aliaj landoj troviĝos inter la kongresanoj.

Kion fari por montri la utilecon de la Lingvo Internacia? Unue ni povas kontakti la fakdelegiton de UEA pri ekologio, mediprotektado kaj naturprotektado (30) kaj fakajn grupojn (ekz.: Asocio de Verduloj Esperantistaj kaj informiĝi kiom da ili ĉeestos la konferencon por prepari kunsidon, kies laborlingvo estos Esperanto. Tiu kunsido, per si mem, estas trafa varbilo. Due ni povas okazigi grandan ekspozicion pri poŝtmarkoj kaj bildkartoj pri naturo, bestoj kaj plantoj el la tuta mondo. Ni povas eksposti ankaŭ ekologiajn E-librojn kaj gramatikojn kaj vortarojn en kiel eble plej multaj lingvoj. Trie, ni devas prepari faldfoliojn pri Esperanto en la plej parolataj lingvoj, helpe al eksterlandaj esperantistoj. Fakte estas multaj farendajoj.

La rezulto de tiu laboro estos fondo de Ekologia Esperanto-Grupo en Brazilo por diskonigi Esperanton inter la ekologiistoj kaj Ekologion inter la esperantistoj.

Se vi interesiĝas pri tio, bonvolu skribi kaj doni proponojn, ideojn, sugestojn, demandojn al:

Aristophio Andrade Alves Filho, D kaj FD pri Ekologio, Caixa Postal 796, 57001



Deziras korespondi

BRAZILIO

ARISTOPHIO ALVES - PK 796 - BR-57001 - Maceio/AL - por ekspozicio dum UN-Konferenco/92 en Brazilo, mi petas pm, bk kaj afiŝojn pri ekologiaj temoj.

BULGARIO

D-ro KONSTANTIN KACAROV (36-jara dentkuracisto) - 2000 Samokov, ul. Zahari Zograf 28 - kun ĉl pri ĉt Esperante, germane kaj hispanlingve.

BOJANA DJANKOVA (16-jara) - 5000 Veliko Tarnovo, ul. Samuil 1 - kun samaĝuloj el ĉl, kolektas pk, pm, buŝtukojn.

HASAN JAKUB HASAN (27-jara) - 7995 Konop, obl. Razgrad - kun ĉl pri ĉt.

POLLANDO

CEZARY (9-jara) kaj JOANNA (12-jara) KLETKIEWICZ - PL-87-600 Bobrowniki nad Wisla, woj. wloclawskie - kun ĉl pri ĉt.

MALGORZATA (23-jara) kaj DARIUSZ

(25-jara) SUAZYNSKI - PL-62-800 Kalisz, ul. Sienkiewicza 45a - tm pri ĉt.

RUMANIO

JUDITH FULOP - str. D. Cantemir 77, bl. C4, sc.A, ap. 6, 3700 Oradea - kun ĉl pri ct.

VIOLA JUHASZ - 3580 Vadu Crisului 379, jud. Bihor - kun ĉl pri ct.

SOVETUNIO

OLGA VASILJEVA (45-jara direktorino de Centro de kulturo kaj klerigo "Amikeco") - SU-300008 Tula-8, ab. jaŝ. 101 - kun ĉl pri ĉt.

NADEJDA MAKSIMOVA (15-jara) - Leningradskaja obl., Valĥovskij r., p. Sjasjstroj, ul. Petrozavodskaja d. 30, kv.3 - kun gejunuloj el ĉl pri ĉt.

RASA MATULIAUSKAITE (24-jara inĝenierino) - Litovio, 235307 Panevezys, Algirdo 92 - 402 B - kun ĉl pri ĉt.

MARIUS BUKELIS (16-jara) - Litovio, 235300 Panevezys, Tulpiu 6 - 49 - kun ĉl.

KIO-KIAM-KIE

La revuo "Paco" ekde januaro 1991 ne plu eldoniĝas en Bulgario. Ĝi aperas en Belgio. Dezirantoj aboni "Paco"-n, povus sendi 400 BF al: Clement Tholet, ĝenerala sekretario de MEM, 54 rue des Hineux, B-4400 Herstal, Belgio.

* * *

Informas bulgarojn pri abono de ekologia bulteno "VER-Dire", pri Internacia Tradukreto, Spiritista societo, Esperanto en entreprenoj, pri Biblia kurso: Ilija ANDREEV, P.K. 120, 9700 Ŝumen.

TRADUKILO, KIU ENHAVAS ESPERANTON

Tra la mondo rondiras digitalaj tradukiloj por esti ie kaj tuj "rememori" kiamaniere ion diri. Ili varias depende de la produktanto (ĉe ni konata sub la nomo "Prevodilac"). Eble la plej interesa estas tiu de la franca produktanto, kiu enhavas eĉ 26 lingvojn (angla, germana, franca, itala, hispana, portugala, greka, araba, pola, hungara, ĉeĥa, rumana, rusa, serbo-kroata, turka, japana, hebrea, svahila, indonesia, sveda, norvega, dana, finna, nederlanda, jida

kaj Esperanto) kaj el ĉiu lingvo po 1000 vortojn. Krome ekzistas alia interesajo: apud ĉiu lingvo estas noto pri lando, kie ĝi estas hejmlingvo. Por Esperanto estas skribite "Eŭropa Lingvo" (Esperanto - Langue Européenne). Se vi deziras mendi ĝin, aŭ deziras ricevi nur informojn, menciuj ke ĝi vin interesas pro la enhavo de Esperanto. La tradukilo kostas 395 francajn frankojn. Adreso: Maison Francaise de Distribution, B.P. 74 - 141, av. de St-Oven, F-75827 Paris Ced'ex 17.

El "ZEL-ano"

ENIGMO

Deĉifru la subajn cifergupojn laŭ jenaj vortdifinoj, havante antaŭvide, ke ĉiu cifero simbolas unu kaj saman literon en ĉiuj ses vortoj.

1. Miksaĵo el kunfanditaj metaloj: 1-2-3-4-3.

2. Angla havenurbo: 5-6-7-8-9-3-2-3.

3. Trikapo hundo gardanta la subteran mondon: 10-11-6-5-11-6-3.

4. Orienta frapinstrumento, uzata por signali aŭ voki, kaj konsistanta el vertikale pendanta metaldisko: 12-3-13-12-3.

5. Jara neta profito de kompanio aŭ de akcia entrepreno aŭ societo, kiu profito estas dividata inter la kompanianoj aŭ la akciuloj: 14-7-15-7-14-11-13-14-3.

6. Rivero en la eŭropa parto de Sovetunio: 14-13-11-16-6-3.

Anstataŭigu la subajn ciferojn per la supre deĉifritaj literoj kaj vi tralegos eldiron de mondfama scienculo pri la internacia lingvo Esperanto.

11-8-16-11-6-1-13-9-3 11-8-9-1-8 2-1
16-2-11-4 5-3-13-1 8-3-2-15-3 14-11 2-17-
14-11-3 16-6-7 2-7-13-12-15-3 7-13-9-11-
6-13-1-10-7-1.

Kompilis: Dimitar HAĜIEV

Noto de la Redakcio: Ni atendas viajn solvojn ĝis la 10-a de novembro k.j. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 12/1991 de "BE".

SOLVOJ

de ENIGMO el n-ro 6/1991:

1. Lapo. 2. Pleŭro. 3. Lasero. 4. Preferi. 5. Retrati. 6. Sperta. 7. Vitralo. 8. Taŭro. 9. Svelta. 10. Javo.

La faroj parolas pli laŭte ol la vortoj.

de VORTENIGMOJ ĜEMELOJ
el n-ro 7/1991

Unua vortenigmo: 1. "Mistera lumo". 2. Fono. 3. Strato. 4. Migdalo. 5. Teo. 6. Rombo. 7. Dio. 8. Elito. 9. Tiko. 10. Plano. 11. Bloko. 12. Romo. 13. Rondo. 14. Ateno.

Dua vortenigmo: 1. Simfonio. 2. Termito. 3. Latero. 4. Strigo. 5. Um. 6. Lato. 7. Ombro. 8. Etiko. 9. Koloro. 10. Lado. 11. Plateno. 12. Bo. 13. Anodo. 14. Mondo.

DUM ESPERANTO-ESTRARKUNSIDO



Esperantistoj al la estraro:
- Ni elektis vin ne nur, por ke parolu, sed precipe por konkrete

Teksto: Nikola

Bulgara Esperantisto

MONATA ORGANO DE BEA

- interesa, varia, riĉa enhavo; ilustrita per bonkvalitaj fotoj kaj grafikaĵoj.
- konstantaj rubrikoj: "Esperantologio", "Originala verkaro", "Lingvaj demandoj", "Juna esperantisto", "Verdaj steletoj", "Enlanda movado", "Deziras korespondi", "Distroj" k.a.
- legantoj en pli ol 51 landoj.

Arabono: 36 levoj, 32 ned. gld. aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Libroservo de UEA (kodo - prsp-r), poŝtfilioj en Bulgario kaj ĉe perantoj en multaj landoj.

Petu provexempleron ĉe la Redakcio de "BE".